

# BEOGRADA VERDA SIFLO

Jaro IV

Beogrado, januaro-aprilo 2009

n-ro 1(8)

*Dejvid Bajnder*

## DOMO MEZE DE VOJO

Serbio estas benita kaj malbenita. Benitaj kaj malbenitaj estas ankaŭ tiuj, kiuj pro geografiaj aŭ aliaj cirkonstancoj estas devigitaj havi rilatojn kun Serbio. Ili kutime falas en kaptilon de ĝia situo.

La kaŭzo estas tute evidenta. Jovan Cvijić, konata serba geografo kaj la plej granda esploristo de Balkano, siatempe ĝin priskribis per jena konstato: „Ni la domon nian konstruis meze de la vojo. Sufiĉas supraĵe rigardi la mapon por kompreni kiom Cvijić pravis. Serbio ne situas nur sur la Danubo, la plej granda eŭropa naviga vojo kiu gvidas al sudoriento; ĝi ankaŭ situas sur la ĉefa eŭropa kontinenta vojo kiu ligas nordon kaj sudon. Ĝuste je tiu vojo la caro Konstantin la Granda (naskita proksime de Niŝ), en la kvara jarcento ekveturis al Bizancon, kie li fondis sian propran majestan ĉefurbon. En la jaro 1095, duonjarmilo de kiam Sudslavoj (Serboj) alvenis al Balkana duoninsulo, Krucistoj kiuj partoprenis en la unua sia invado, je tiu ĉi vojo ekmarŝis al Sankta lando. Per tiu ĉi vojo alvenis ankaŭ turkaj, hungaraj kaj aŭstraj konkerantoj. Ankaŭ Vermacht eluzis tiun ĉi vojon.

Hodiaŭ NATO ankaŭ estas ĉe la pordo de serba domo konstruita meze de antikva balkana vojo. NATO jam 1999 bombardis tiun ĉi domon kaj mortigis multajn civitanojn; jam grasa kaj plidikiĝanta, eĉ hodiaŭ frapas neniel ĝentile, sed brute atakegas la pardonon serban por detruo ĝin.

Tradukis: *d-ro M. Stojanović*

Eldonas Esperanto societo „Radomir Klajić“, Terazije 42, Beogrado  
Eldonata surpapere kaj sur kompakta disko (CD) kiel Word-dokumento  
Prezo: 70 din. unu ekzemplero, 200 din. jarabono (sendokostoj ne enkalkulitaj),  
sendepende ĉu surpapere aŭ sur kompakta disko  
Por eksterlando unu ekzemplero 2 €, jarabono 6 € (plus sendokostoj)  
Aperas trifoje jare

---

**Ĉefredaktoro:** d-ro Miodrag Stojanović,  
**Redakta komitato:** d-ro Pribislav Marinković, Zlatoje Martinov,  
Agnesa Eremija, Mirjana Šundeke, Etelka Kiš-Jakupović,  
Tereza Kapista, Nedeljka Ložajić, Slavica Stoilković, Branko Despotović,  
Dimitrije Janičić, m-ro Gvozden Sredić, Velibor Simović, Milan Olbina,  
**Teknika redakto:** Adem Jakupović

# Originala prozo

## ILUŜKA<sup>1</sup>

Szabadka (Subotica) tiam apartenis al Aŭstrohungario kiam la ĉielbluaj okuletoj ekvidis la mondon. En tiu urbo naskiĝis knabino en la jaro. 1908. Kreskante ŝi ĉiam estis vigla, bonhumora kaj antaŭ ĉio ege saĝa, diligenta. En la jaro 1919 tiu regiono laŭ la trianona packontrakto estis aljuĝita al Reĝlando Jugoslavio ricevante nomon Subotica. Iluŝka kreskis kaj ege deziris studi. Tio eblis nur en Jura fakultato kiu ekzistis en Subotica tiam. Ŝi entuasmiĝis kun la ideo, ke ŝi kiel virino estu juĝistino. Brile ŝi finis la fakultaton kaj konkursis por laboro.

Laŭ la dekreto de Ministerio ŝi estis sendita al urbo Ĉ. al interna Serbio. Ŝi preskaŭ flugis pro la ĝojo al la unua laborposteno, plena je entuziasmo.

La unuan fojon ŝi forlasis la naskiĝurbon kaj la patrinon-vidvinon. Antaŭ forvojaĝo ŝi bone laborigis la kudristinon, ke preparu al ŝi kelkajn novajn robojn, nun iom pli seriozajn, ol tiuj, kiujn ŝi portadis dum studado. Ŝi estis nur 23-jara havante blondan buklan hararon kaj ĉiam rideton sur vizaĝo.

Sed... la prezidanto de la juĝejo kun granda miro legis la dekretan, farante sulkojn sur la frunto. Fine, deklaris ke virino en lia urbo ne povas esti juĝistino, precipe ne kun hungara akcento parolanta la serban. Ŝi deveninta el eksa Aŭstrohungario kaj judino kun kosmopolitisma edukado, ne komprenis la decidon de la prezidento. Ĉar en ŝia urbo eblis al virinoj havi iun ajn profesion. Ŝi, kiel malŝveliginta balono, sen pliaj iluzioj iris al Ministerio petante alian laborlokon. Ili spite al tiu durkapa prezidanto de la juĝejo, insistis ke ŝi nepre estus ĵus en tiu urbo akceptita. Do, finfine tio realiĝis, kaj ŝi kun granda atento kaj plenkora kontento komencis sian respondecan laboron.

Ĉiuj ekamis ŝin kaj estimis pro la seriozeco de ŝia laboro. Ŝi ege atentis ke estu justa sen influo de aliaj kontraŭ ŝiaj decidoj.

Juna serba, ortodoksa juristo ekamis la belan hungarinon, judinon. Ili eĉ foje kune vojaĝis al Beogrado, kie fotis ilin surstrata fotisto, kiu tuj ellaboris la foton. Ili sentis grandegan simpatian unu al alia kaj tio iom post iom fariĝis vera, profunda kaj sincera amo.

---

<sup>1</sup> *Iluŝka estas karesnomo en hungara por Ilona (Helena).*

Sed, ho, ve, venis la dua mondmilito kaj al ŝi de hejmo mesaĝis ke tuj revenu al naskiĝloko ĉar la patrino ne deziras esti sola en tiu milita ŝtormo kaj grizaj pezaj nebuloj kiuj kolektiĝis sur juddevenaj homoj. La viro akompanis ŝin al stacidomo, ne supozante ke neniam plu ili vidos unu la alian.

La antaŭsento de la patrino estis bedaŭrinde pravigita. Unue la germanoj forpelis la fratino de Iluŝka, kiu edziniĝis nur kelkajn monatojn frue al vidvo kiu havis du infanojn pri kiuj ŝi zorgis kun vera patrina koro. Ŝi estis mortigita kune kun la infanoj kiuj eĉ ne estis ŝiaj. La edzo punlaboris en Germanio.

Poste venis la vico kaj la saman tagon al geto estis kondukita la patrino kune kun Iluŝka. Pere de iu gardisto kontraŭ iom da oraj juvelaĵoj, kiun Iluŝka sukcesis kaŝi en la hararon la gardisto ekceptis de ŝi leteron skribitan al amata viro, kun morna informo ke ŝi troviĝas en geto, verŝajne transportota al konclogoro. Vagonoj por transporto de bestoj estis plenigitaj kun judoj, ciganoj, komunistoj kaj aliaj “malamikoj” kaj virinoj el geto. Transportitaj dum pliaj tagoj al grandega naciista fifama logoro. Ili unue ne sciis kie troviĝas sed tiuj kiuj jam estis en logoro informis ilin

- Vi estas en Bergen Belsen.
- Tie ŝiaj blondaj haroj tuj estis fortonditaj, ricevis tatuitan numeron, tio signifas ke en konclogoro ili ne plu estis homoj nur numeroj.

En tiu urbo kie la viro vivis aperis kunlaborantoj kun naciistoj. Li por esti solidara kun amata judino, ne plu deziris labori al germanaj okupantoj. Tamen, li ĉiutage aŭskultis novaĵojn ke en tiuj logoroj ekzistas krematorioj kaj ke centoj da homoj mortadas, aŭ pafitaj aŭ per gaso sufokigitaj. Li perdis ĉiun esperon ke li iam revidos la karan, ĉiam ridetantan vizaĝon de la amata amikino kiun li planis edzinigi. Li dum tagoj kaj noktoj sen manĝo kaj dormo, nur pensadis kion fari. Liaj fratinoj diris ke li devas forgesi ŝin, ĉar eble ŝi jam eĉ ne vivas. Je tiu penso enkape, ne dezirante konatoĝi kun alia virino, sed resti fidela al sia amo, li iris al monaĥejo kaj fariĝis ortodoksa monaĥo.

La milito finiĝis. La kampo estis liberigita kaj Iluŝka estis travivanta kune kun la patrino la finon de la milito. Ŝi estis alta, forta virino kaj dank’ al tio ŝi laboris kaj ŝia eltenemo estis bezonata, do, ŝin ne bruligis. Unue malaperis la malsanaj kaj la malfortaj. Kiam malfermiĝis la feraj pordegoj jam ankaŭ la patrino kaj Iluŝka ne havis forton. En lastaj monatoj ili apenaŭ ricevis manĝaĵon. Se ne venus la liberigantoj nur post kelkaj tagoj ili estus malsatmortontaj. Ĉiuj estis ege malsanaj kaj maldikaj. La Ruĝa Kruco decidis vojaĝigi ilin al Ĉeĥoslovakio al urbo la plej proksima loko kie oni povus esti prizorgataj. Unue estis kuracitaj kaj nutritaj por ke povu elteni la vojaĝon al la hejmo. Tiuj ses semajnoj ŝajnis al ili pli longaj ol la antaŭaj jaroj, ĉar nun liberaj estis ligitaj al lito, senfortaj al vojaĝo.

Finfine venis la tago kaj ili estis envagonitaj kaj ĉiuj direktitaj diversflanken al hejmoj.

La koroj batadis pro feliĉo pli forte ol iam ajn. Ili eĉ ne kredis ke tio eblas ke ili saviĝis el makzeloj de sovaĝaj bestoj. Iluŝka ege ĝojis ĉar ŝia unua penso estis ke ŝi tuj devos serĉi la amatan viron. Sed la vivo estas kruela kaj senkopata. Dudek kilometrojn antaŭ la landlimo ŝia patrino subite mortis sidante apud ŝi en vagono. La deĵorantaj akopanantoj rimarkis tion kaj forprenis la patrinon el vagono, sen permeso, ke Iluŝka eliru el vagono. Ŝi neniam eksciis kie la patrino estis entombigita, neniam povis viziti ŝian tombon. Foje ŝi diris, tamen mi estas feliĉa ke la patrino travivis la senton de libereco kaj ke ne mortis en krematorio. La malforta kaj suferanta koro de patrino ne povis elteni la feliĉon kaj simple krevis.

Iluŝka sola kun granda doloro, hejmen iris. Ŝi eksciis ke la frato estas viva kaj ŝi atendis lian hejmenvenon. La urbo estis plena da sovjetaj milithandikapuloj kaj vundintaj soldatoj. Ĉiu lernejo en la urbo estis hospitalo. Ŝi terurigite rigardis kiel la unupieda invalido gvidas la blindigitan kamaradon kaj apude estis la tria sen manoj. Kun tristo ŝi rigardis ilin kun doloranta koro, konsciante ke ili devis militi ke la homoj estu liberigitaj de faŝistoj.

Ŝi komencis serĉi la familianojn sed preskaŭ neniu revenis al ŝia urbo, mortigitaj estis pli ol 4000 judoj. (Monumento omaĝe al ili estis inaŭgurita 30 jarojn post la milito en Subotica en la korto de la plej bela sinagogo en Serbio)

Ŝi fortiĝis kaj denove devis serĉi laboron. Ŝi ne plu emis loĝi en naskiĝurbo. Tie ne plu estis parencoj nek konatuloj. Nun la Ministerio proponis al ŝi Beogradon. Ŝi akceptis. Skribis al kelkaj homoj al urbo Ĉ. petante informon pri amata homo. Ĉiuj respondis ke nenion scias pri li, li forlasis la urbon meze de milito.

Ŝi neniam edziniĝis nek sentis la ĝuon de patrineco. Vivis sola. Tamen dum multaj jaroj esperis ke iun tagon iu frapos la pordon kaj ŝi malfermos la pordon al LI.

Mi konatiĝis kun ŝi kiam mi faris esperantan ekzamenon ĉar ŝi estinte ano de ekzamena komisiono tuj diris al mi:

– Ho, kara mi naskiĝis en sama urbo kie vi. Tiel ni amikiĝis.

Multfoje ŝi klarigis al mi kial ŝi eklernis Esperanton. La kialo ne estis la lingvoscio sed la ideo ke ĉiuj homoj sendepende de haŭtkoloro, religia aparteneco kaj nacieco estas amikoj kaj samrajtaj. Respektindaj kaj akcepteblaj. Do, mi ankaŭ kredis ke tio estas vero, ke la homoj estas kun samaj sentoj en ĉiu mondparto. Ili ploras kiam estas malĝojaj kaj ridas pro la beleco de la mondo kaj feliĉo.

Mi kun ŝi havis kutimon unu du foje monate iri al ekskursoj kaj foje ni kune veturis al tiu urbo Ĉ. en Serbio. Tie ŝi montris al mi la juĝejon kie laboris kaj vole ne vole ekploris. Mi ne komprenis kial plori nur vidante la konstruaĵon. Mi demandis:

- Kial vi ploras?
- Alian fojon mi respondos, nun mi ne kapablas.

Pasis iom da monatoj kiam ŝi dum mia vizito montris al mi foton sur kiu estis ŝi juna, svelta, kun moderna ĉapelo surkape, kaj kun feliĉa rideto. Apud ŝi estis same alta bela nigrahara viro.

- Tiu estas LI, diris ŝi mallaŭte.
- Mi ne konas lin, pri kiu vi parolas?
- Mi iam konis lin, sed li ne plu vivas.
- Tiu estis la foto el Beogrado. La unusola dokumento pri ŝia amo.

Mi eksilentis vidante kiom doloriga estas por ŝi paroli pri tio.

Kiam ŝi revenis kaj eklaboris en 1946 en Beogrado la fratinoj de LI post eble tridek jaroj eksciis ke ŝi estas viva, loĝanta en Beogrado. Tiuj de kiuj ŝi petis informon pri ilia frato informis la fratinojn ke ŝi vivas. Kiam ili trovis ŝin kaj vizitis la unuan fojon ili ne diris ke la frato estas monaĥo kaj ke li vivas.

La fratinoj iris kaj informis la fraton ke Iľuška vivas, sed li triste kun amara kordoloro kaj larmoj diris:

– Jam estas tro malfrue, mi jam alkutimiĝis al monaĥa vivo kaj mi certe ne plu povos feliĉigi ŝin. Estu pli sobre ke ŝi ne eksciis pri mi. Mi alportis mian amon al monaĥejo kaj ĝi restu inter monaĥejaj muroj. La superulo ne decidis tiel ke ni estu kune. Do, mi nenion nun povas ŝanĝi. Dio benu ŝin kaj vivu longe kaj sane. Mi deziras havi pri ŝi rememoron tian kiam ni estis junaj, kaj tiun bildon ŝian mi ne deziras forigi el mia koro.

Post denove multaj monatoj mi vizitis ŝin kaj mi trovis en ŝia hejmo du virinojn en funebraj nigraj vestaĵoj. Unue ŝi klarigis ke la virinoj estas fratinoj de LI kaj ke li mortis antaŭ nelonge. Post ilia foriro ŝi ploregis, ploregis, veante kaj kun profunda tristo. Tiam plena je ĉagreno komencis rakonti, parolis, parolis forverŝante ĉiun doloron el si kaj tiam mi eksciis ŝian tutan vivhistorion pri kio ŝi silentis dum pli ol kvindek jarojn. Ŝi malkovris la amon kiun ŝi portis en koro dum tuta vivo kaj kio ne povis esti realigita.

Antaŭ ŝia forveturo al naskiĝurbo ŝi diris:

– Mi havas unu peton – bonvolu ne kremaciigu min. Pli ol du milionoj da judoj estis bruligitaj, eble mi meritas esti entombigita en teron. La juda tombejo estas bela en Subotica kaj estas tie loko, ĉar oni ne havas kiun entobigi tien. Eble nur 1200 judoj restis vivantaj en Serbio. Post kelkaj monatoj en la jaro 1993 ŝi fermis la blujn okulojn por ĉiam.

Ni esperantistoj akompanis ŝian ĉerkon ĝis Juda tombejo en Subotica kaj enterigis ŝin laŭ ŝia lasta deziro.

Tereza Kapista

## HELPO

Nikola Bulatović kaj mi partoprenis kune en la konstruado de aŭtovojo nomata **Frateco kaj unueco**, tra iama Jugoslavio. Ni estis studentoj, junaj, gajaj, fortaj, plenaj de ĝojo je vivo, bonaj kamaradoj. Post laciga labortago ni ofte dum horoj interparoladis pri vivo, amo, arto, historio... ĉiuj tiuj rakontoj paliĝis dum la tempo, sed la rakonton, kiun tiam li rakontis, mi ne forgesis. Kaj mi ne volas forgesi ĝin. Ju pli mi estas aĝa kaj spertoriĉa – des pli kaj pli proksima al mi estas ĝia msaĝo.

– Do, iam delonge, komencis Nikola – vivis unu sukcesa, agema kaj riĉa kamparano kiu havis filon ununuran. Multe li amis la filon. Kiel ne ami lin – unika filo, heredanto de sopiroj de la patro, de la nomo, de la bieno, daŭriganto de la familia genealogio. La filo, superŝutita per la zorgo de la patro kaj per la riĉaĵo perlaborita per malfacila laboro, elkreskia bela knabo, sed lin malfacila laboro ne allogis. Kafejoj, inoj, hazardludoj, drinkaĵoj kaj amuziĝo estis lia elekto. La patro vidis tion, grumblis, sed la filo neglektis liajn riproĉojn.

Antaŭ la morto, la patro alvokis la filon.

– Ho, mia kara, baldaŭ mi mortos. Al ci restos mia tuta riĉaĵo. Mi konas cin – mi kredas ke ci ĉion disipos. Tiam, kiam al ci la vivo fariĝos malama, kiam vi ekdeziros malaperi, jen ĉi tiu ŝlosilo de nia malnova kabano en la montaro. En la kabano pendas la ŝnurego sub la ĉefa trabo. Ĉio estas preta ke ci pendiĝu.

– Kara paĉjo, neniam mi disipos tutan nian bienon. Mi ne estos pli prodigulo. Mi devos pliboniĝi.

– Mi diris kion mi havis diri, kaj ci ĵuru al mi ke vi obeos min, ho, Dio ne donu, se tiel tamen okazos. La filo promesis. Post du tagoj la patro foriris en eternecon.

La filo, je la komenco, estimis la voton de la patro, sed baldaŭ ĝin forgesis. Senkompate li disipadis la heredaĵon. Post dekoblo de jaroj li estiĝis la plej povra en la vilaĝo. Unu tagon ekinvitis lin bona amiko de lia patro viziti edziĝfeston. En tiu loko estis la kutimo ne viziti edziĝfeston sen la donaco, almenaŭ bakita porkido.

De la tuta lia riĉaĵo restis nenio, sen unu bona pelt-surtuto. Tion li gardis, ĉar ĝi estis al li multe bezonata vintre, ĉar li havis neniom da hejtaĵo. Al li estis multe grava tiu festo de bona amiko de lia patro kaj lia filo, kiu estis lia lasta amiko, li ne kuraĝis preterlasi.

Li decidis vendi surtuton kaj aĉeti donacon por la festo. Li aĉetis la porkidon, bakis ĝin kaj aliris la grandan belan feston, kiel vera domestro. En la festo neniu kredis ke li aĉetis porkidon eĉ iuj moke demandis – kie li ŝtelis tiel belan porkidon? Tio lin multe dolorigis. Tiam li ekmemoris pri lastaj vortoj de sia patro. Li prenis la ŝlosilon, kiu estis la nura resto, kaj tuj forkuris en la montaron, en la kabanon.

Li pendiĝis.

En tiu momento la trabego rompiĝis kaj el ĝi falis multaj dukatoj kaj unu letero. La filo falis, svenis tute ekscitita per sia stato kaj per subita ŝanĝo de cirkostancoj. Kiam li rekonsciiĝis, li trovis la leteron kaj tralegis:

“Kara mia filo – estas skribita en la letero – mi multe eraris helpante al ci en ĉiuj okazoj. Tiel mi al kutimigis cin ne ĝui en laboro sed en disipado, ke ci elspezas tion kion aliaj gajnas. Facile estas fremdan penon elspezadi. Eble cin ĉi tio senfrenzigos. Ĉi tio estas mia lasta helpo. Se ĉi sperto ne helpis, al ci ne ekzistas helpo. Esperante plej bonan, lastan fojon cin salutas cia patro.”

Li ofte ripetadis, ke la feliĉo kaj laboro estas la fratino kaj la frato.

Oni famas ke li tiel posteulojn edukis.

Nikola estis unu el ili.

Velibor Simović



## KRALJEVIĈ MARKO (1)

Tri rakontoj

### Rimarko

*En la informilo de Internacia Esperanta muzeo (IEM) el Vieno, n-ro 158, denove, kiel speciala numero, aperis libreto M. Abesgus: KRALJEVIĈ MARKO, tri originalaj rakontoj el la jaro 1896. Ni kredas ke rakontoj estas interesaj por niaj legantoj. En Antaŭparolo, interalie, pri rakontoj oni diris:*

"La originala rakonto "Kraljeviĉ Marko" de M. Abesgus pritraktas temon, kiu multe okupis la esperanlistojn de la unuaj jaroj: la antagonismo inter nacia sento kaj la kosmopoliteco de Esperanto. Fakte tiu-tempe naciismo ankoraŭ ne miskreditiĝis; por ceteraj etnoj ĝi estis fakte esenca en la akiro aŭ la konservo de sia identeco."

Vieno, 1991 04 30 Herbert Mayer

La "Enciklopedio de Esperanto" (Budapeŝto, 1933) raportas sur paĝo 13 jene pri la aŭtoro: "Abesgus M., ruso, bankoficisto, komence en Baku, poste en Teheran, kie li estis unua pioniro de E. Al lia plumo apartenas belaj originalaj skizoj pri Baku en "LI" [Lingvo Internacia] kaj originala rakonto "Kraljeviĉ Marko" premiita en la literatura konkurso de 1896."

*Kun permeso s-ro Mayer, donita al s-no Tereza Kapista, ni aperigos la rakontojn en venontaj numeroj.*

Originala rakonto sendita al la Juĝanta Komitato de la internacia literatura konkurso 1896 kaj honorita per arĝenta ĵetono.

"Ne mortis la reĝido Marko; li dormas en monta kaverno; lian dormon gardas *vila*; apud li staras lia ĉevalo *ŝarac* kaj manĝas muskon; lia glavo staras en ŝtono... Venos la tempo, la glavo elsaltos el la ŝtono, la regido Marko vekigos, prenos per siaj manoj la glavon kaj forpelos la turkojn kaj restarigos la serban imperion."

Tiel kantis, sidante sur la ferdeko de Danuba vaporŝipo, homo de ĉirkaŭ tridek kvin jaroj, kun delikataj kaj noblaj trajtoj, grizaj okuloj, brilantaj je flamo de entuziasmo, vestita je ordinara kostumo de serbaj vilaĝanoj: tola ĉemizo, metita super la pantalonon, kuntiritan apud la genuoj, mallonga, dika cinamkolora drapa jako, malalta feso [= fezo] sen peniko kaj belaj ledaj ŝuoj, vidataj nur ĉe serboj, ornamitaj supre per plektaĵo de maldikaj rimenetoj. Li akompanis sin per "gusle", – stranga korda instrumento de duongloba formo kun unu sola kordo, kiun oni ludas per hara arĉo; la sonoj de "gusle" ne estas sen agrableco, sed kompreneble, tiuj ĉi sonoj ne povas fari muzikan frazon, kaj servas nur por esti fundamento de la pentraĵo, kiun faras la vortoj de la kantisto.

Estis suna oktobra tago – unu el tiuj tagoj, kiuj estas al homoj iafoje donacataj de aŭtuno antaŭ ol ĝi fine cedos sian lokon al la vintro. La vaporŝipo, egalmezure laborante per siaj radoj, bataladis kun peno kontraŭ la fluo de Danubo, kiu estas tie ĉi tre rapida; tio ĉi estis pli malproksime de la Fera Pordego, tie, kie la Danubo sin trabatadas inter la disbranĉoj de Balkanoj (de serba flanko) kaj de Karpatoj (de hungara

flanko) kaj fluas rapide sur terure mallarĝa kaj profunda lito. De ambau flankoj la bordoj sin levas perpendikulare la riveron [= de la rivero] ĝis timiga alto, kompare kun kia homo ŝajnas nemezurebla malgranda kaj sensignifa, aparte se oni ekpensas, ke tiuj ĉi bordoj staris tiel same neŝanceleble, ke tiu ĉi rivero fluis tiel same rapidege kaj la tuta naturo tie ĉi estis tia sama, kiam ne ekzistis ankoraŭ la regnoj, limataj nun de tiu ĉi rivero, kaj kiam la popoloj, trinkantaj nun ĝian akvon, ankoraŭ migradis en ebenaĵoj de Azio kaj Eŭropo orienta! la trankviliganta sento, ia konscio de malgrandeco de ĉiaj niaj pasioj penetras en la animon, kiam subite sur la serba bordo sur la terura alto oni ekvidas glatehakitan ŝtonegon kaj sur ĝi – latinan surskribon kun du grandegliteraj vortoj supretitole: "Tabula Trajani". Tiu ĉi surskribo ekzistas preskaŭ mil okcent jaroj! Post ĝi oni renkontas poste pli trankvile Golubac'on, la antikvan kastelon de serbaj reĝoj (antaŭ ol la perdo de la maldependeco): ĝi ekzistas daŭre [= dum] sescent jaroj... La montoj kaj la rivero estis tiaj samaj, kiel nun, kiam tie ĉi trakondukis siajn legiojn la venka roma imperiestro, kaj kiu scias, kiom da centjaroj antaŭ tio ili estis tiaj samaj, kaj kiom da centjaroj post ni ili estos tiaj samaj! La naturo estas tiel same ŝanĝebla, kiel ĉio en la mondo, sed ĝiaj tagoj estas miljaroj por ni, kaj al niaj okuloj ĝi ŝajnas malŝanĝata! Sed la homoj sin ŝanĝas pli rapide ol la naturo, kaj la aŭskultintoj la kantiston, kiu ĵus finis la kanton pri la regido Marko (Kraljeviĉ Marko, kiel diras serboj), – tiu ĉi publiko similis nek je romaj legioneroj [= legianoj], nek je dakoj [= dacoj], kiujn ili estis devigataj humiligi sur la bordoj de Danubo; multkoloramase staris, sidis kaj kuŝis vestitaj je plej diversaj kaj originalaj kostumoj, serboj el la "Ŝumadia" ("arbara lando", t.e. la nuna regno Serbujo), el la Malnova Serbujo, el la aŭstra Slavonio, el la Bosna kaj Hercegovina, valakoj [= valaĥoj], bulgaroj, makedonanoj, cincaroj (rumanoj el Makedonujo), hungaroj, ciganoj, turkoj, hispanaj hebreoj; nur malofte estis vidata ĉapelo kaj eŭropekudrita supervesto; tiu ĉi tuta diversvizaĝa amaso aŭskultadis atente la kantiston; eble ne ĉiuj komprenis bone la vortojn de l'serba kanto, sed ĉiuj, videble, estis tuŝitaj de la kora sento kaj de la entuziasmo, kiuj ĉirkaŭkaptis la kantiston kaj estis aŭdebla el ĉia sono de lia voĉo.

La kanto estis finita, kaj fariĝis silento; la amaso staris senmove, kvazaŭ atendante ankoraŭ iom da kantoj; la kantisto kondukis facile la arĉon sur lia instrumento; subite li eklevis la kapon kaj ekkantis denove; mi jam sciis tiom la serban lingvon, ke [mi] komprenis el kelkaj bulgarismoj, ke tiu ĉi kanto estis verkita, videble, de loĝantoj sur la serba-bulgara limo:

Sufiĉe ni iradis, sufiĉe ni promenadis,  
Sufiĉe ni promenadis la ebenon de Ŝumadia,  
Sufiĉe, ke ni pereu, ni, nigraj, malriĉaj,

Eklevu vian standardon, Manuŝ-vojevodo  
Niaj virinoj estas nigraj kukoloj,  
Niaj patrinoj estas nigrestataj,  
Niaj patroj estas nerazataj,  
Niaj fratinoj estas nekombataj,  
Niaj infanoj estas sklavoĵoj al turkoj.  
Sufiĉe ni iradis, sufiĉe ni promenadis,  
Sufiĉe ni promenadis ebenon de Ŝumadia,  
Sufiĉe ni manĝis bakitajn ŝafidojn,  
Sufiĉe ni manĝis blankajn pogaĉojn  
Ni dismetu, ni dispelu la arojn de tiranoj,  
Ni liberigu almenaŭ niajn malgrandajn infanojn!

Ŝajnis, ke la sovaĝa energio de tiu ĉi kanto metiĝis en la kantiston; liaj okuloj ekbrilis ankoraŭ pli, lia talio rektiĝis, kaj kiam li finis, la amaso ŝajnis esti premita per deziro de libereco kaj de venĝo al la tiranoj, kiujn tuŝis la kanto. La amaso ree eksilentis, sed la kantisto profunde ekĝemis kaj malrapide sin levis de sia loko; tio ĉi estis klara signo de tio, ke estos pli nenia kanto; mi atendis, ke la kantisto komencos ĉirkaŭiri la publikon, sed okazis nenio simila; la amaso disiradis, kaj la kantisto tute ne ekprovis ricevi ion por la liverita plezuro; ĉu li estis artisto, malestimanta monon, aŭ li jam estis ĉirkaŭirinta la amason, kaj la lastaj kantoj, kiujn mi aŭskultis estis dankajo por la malavara

doneco [= donemo] de la publiko? Mi aliris al la kantisto.

– Pardonu al mi, diris mi, penante klare elparoladi la serbajn vortojn, ankoraŭ nekutimajn por mi: kredeble, vi jam ricevis antaŭ ol mi alvenis kaj aŭskultis; jen... kaj mi eltiris al li arĝentan moneron.

– La sinjoro, certe, estas ruso? demandis li, ne prenante la moneron kaj ne respondante rekte al mia demando.

– Jes, mi estas rusano, sed de kio vi povis diveni tion ĉi?

Li ekridetis.

– La sinjoro ja estas vestita je pelto; ĉu tie ĉi iu vojaĝas vestita je pelto? eraro estas nebla.

Efektive, tio ĉi estis vero; sur la tuta vaporŝipo mi sola estis vestita je pelto.

– Ĉu la sinjoro komprenis tion, kion mi kantis? Ĉu la sinjoro scias, kiu estis Kraljeviĉ Marko? Mi vidis multajn rusajn memvolulojn ĉe ni, en Serbujo, dum la milito por la liberigo, sed tre malmultaj sciis pri li.

Mi ne volis jesi lian opinion pri miaj sampatrujanoj, kaj mi rakontis al li kiel mi povis kaj kion mi sciis pri la historia Marko, filo de reĝo

Vukašin Mrnjavčević; mi memorigis al li, ke li estis unu el la kontraŭuloj de la lasta serba regnestro Lazar Hrebeljanović; ke poste li estis vasalo de turkoj kaj estante ilia ligano li pereis en Valakujo en la jaro 1394 dum militiro.

Kun neesprimebla mireco rigardis min la kantisto dum mi parolis.

– Eble, estis ankaŭ tia Marko, elparolis li malrapide, kiam mi eksilentis; – mi ne scias... nur tio ĉi ne estas tiu Kraljević Marko, kaj vi, videble pri la vera Kraljević Marko ne scias...

Mi komprenis, ke mi faris eraregon. Ĉu havis rilaton al historia persono de Kraljević Marko al la kantisto-entuziasto [= entuziasmulo]? Li sciis nur sian Kraljević Markon, la Kraljević Markon de legendoj, tiun, kiu dormas jam multe da centjaroj kaj, kiam "venos lia horo", vekigōs kaj liberigos de tiranoj la tutan serban nacion – kaj tiu ĉi Kraljević Marko estas neniom simila je la "mia"...

Kaj li ripetis al mi la legendon. – Kaj venos lia horo, kiam li vekigōs por liberigi sian nacion, kaj – kiu scias? – eble, tiu ĉi horo estas proksima; estas eble ke Kraljević Marko jam vekigis kaj iradas inter ni, sed lia horo ankoraŭ ne venis, kaj ni lin ne konas!

La okuloj de l'kantisto strange ekbrilis ĉe tiuj ĉi vortoj; ĉu tio ĉi estis okulbrilo de entuziasto aŭ de frenezulo?

– En ĉia okazo, mi diris, la serboj de Ŝumadia jam estas liberigitaj, kaj sekve ili ne bezonas la vekigōn de Kraljević Marko.

Tiuj ĉi vortoj impresis la kantiston tiel forte, kiel mi ne povis atendi; li eksaltis de l'benko, sur kian li eksidiĝis.

– Sinjoro, mi aŭdis, ke la italoj ne povas trankviliĝi, ĉar la malgranda parto de ilia nacio ankoraŭ ne estas unuigita kun la patrujo, ankoraŭ ne havas rajton esti nomataj italanoj; tiaj serboj ekzistas ankoraŭ en pli multa nombro, kaj eble nur unu kvarono de l'serba nacio estas liberigita... estas sufiĉe por efikado de Kraljević Marko – nur li venu!

Li sidiĝis sur la benkon kaj enpeniĝis.

La krepusko malleviĝis; super la rivero pendis nebuleto, tra kiu estis vidataj fantaziaj dentetoj kaj turoj de l'fortikaĵo de l'urbo Smederevo (Semendria), al kiu alproksimiĝis la vaporŝipo.

La kantisto leviĝis.

– La sinjoro vojaĝas Belgradon?

– Jes.

– Mi ankaŭ vojaĝas tien. Ĉu estas eble sciigi vian estimandan nomon?

Mi min nomis.

– Kaj mi estas Marko Kraljeviĉ.

Se li dirus, ke li estas kapitano de l'republiko San-Marino, reĝo de l'insulo Samoa, duko de l'afrika gento Njam-Njam, – mi estus frapita malpli!... "Aŭ tio ĉi estas malĝentila kaj sensenca mistifiko, aŭ tiu ĉi homo estas freneza", mi ekpensis.

– Ne miru, sinjoro, diris li facile ridetinte; – Marko estas mia baptonomo, kaj Kraljeviĉ estas nia familinomo; eble ian mian antaŭulon oni alnomis "kralj" (reĝo), kaj estas ebla, ke iu el ili estis efektive reĝo, – kiu scias tion? Sed en nia familio neniam estis Marko. Unufoje mia patro vidis en sonĝo: venis al li vila kaj diris: ĉe vi estos naskita filo, kaj vi lin nomos Marko." – En la sekvanta tago mi estis naskita...

Videble, ke la okaza simileco de l'onomo, la sonĝo de l'patro, kiu ankaŭ estis, kredeble, entuziasto, konstanta revado en regiono de la legendo, – ĉio tio ĉi ne povis ne impresi je l'ekscita cerbo de l'malfeliĉulo, kaj liaj vortoj, ke la atendata Kraljeviĉ Marko iradas inter ni kaj atendas nur, ke eksonoru lia horo, – ĉu tiuj ĉi vortoj ne rilatis al li mem?

– Bonan nokton, diris Marko Kraljeviĉ forirante: – Dio helpos, ni nin vidos en Belgrado.

La vaporŝipo proksimiĝis al la smedereva haveno, kies sekvanta estas Belgrado. La suriranta [= leviĝanta] luno arĝentigis la dentetojn kaj turoj n de smedereva fortikaĵo, kies antikvaj muroj sin levas rekte el la akvoj de l'rivero ankoraŭ pli antikva.



## Vojaĝo sen limoj

“La libro, ĝenerale, estas”, laŭ vortoj de praa egipta poeto, “pli bela ol palaco aŭ kastelo, la plej bela monumento – monumento de la homa spirito.”

Nur la homo disponas pri kapablo esprimiĝi per vortoj kaj lasi skriban spuron pri sia ekzisto. Dank’ al evoluo de la homa socio, la libro ekestas disponebla al ĉiu malanalfabeta homo.

Ĝi plibeligas la vivon; ĝin limigas nek la spaco, nek la tempo. Kun ĝi ni vojaĝas per nekonjekteblaj rapidecoj. Superpluvegas nin foraj pluvoj kaj varmigas nin iuj aliaj sunoj. En momento ekvivas kaj ekparolas en ni iu nekonata urbo, arbaro, rivero, maro, kosmo... Ni ekkonas nekonitan kaj netuŝitan. Vorto ligas malproksimajn parolantojn, bildigas realan vivon, homajn karakterojn, iliajn pensojn, sentojn, faciligas ekhavi imagon pri la mondo ĉirkaŭanta nin. Idealoj, revoj kaj la spertoj de la personecoj postlasas spuron, riĉigas la vivon kaj restas nesekegebla fonto de forto por movigo de la homaj potencoj

La konscio pri tio ke, eĉ sen la vido, la homo havas eblecon memstare droni en ĉi tiun trezoron de la homa spirito, donas al ni memfidon, kredon je grandeco de la homo kaj eblecoj je ties memefektiviĝo, ektrovo de si mem, eblo esti granda, sia. Fido je si mem kaj je la aliaj alportas intelektan liberigon, kaj «libereco estas», kiel diris unu poeto «aero kaj maro». Kaj, kiam li trovas sian vojon, manko de la vido ne plu estas ĉefa problemo en ties vivo. Li sin vidas libera kaj valora kaj tio estas kondiĉo ke ankaŭ aliaj vidas lin tia. Post tralego de la unua libro en Brajlo, blinda homo ne plu estas soleca kaj senhelpa. Miloj da homoj lante eniras lian vivon kun siaj zorgoj, pensoj kaj ĝojoj. Li ĉirkaŭiras mondojn kaj ekkonas atingojn de diversaj civilizoj. Li alproksimiĝas al tio kio estas tro alta, tro profunda, tro fora por ties sensoj.

Kun siaj ses punktoj, Braille eligis alfabeton egalan al tiu kiun havas vidantaj personoj kaj poste ankaŭ ĉefajn matematikajn signojn kaj simbolojn, muziknotan skribon, eĉ stenografion Brajlan kaj tiel, kompare kun antaŭaj provoj, kreis pli simplan skribon, kiu plifaciligis skribadon kaj legadon eĉ ĉe foresto de tiel grava senso kiel estas la vidsenso. Malgraŭ tio, ke por ekhavo de legorapideco de Brajlteksto oni bezonas pli da tempo, kontenton kiun ofertas ekregado de la legolerteco, senpera aliro al la libro, ne povas anstataŭigi voĉleganto, voĉsoftvaro.

Ne ekzistas sufiĉe da libroj en Brajlo, ili okupas tro da spaco, sed tio neniel estas kaŭzo, ke oni ne dediĉu al ĝi atenton kiun ĝi sendube meritas.

Tiu ĉi simpla, sed tiel unika eltrovaĵo, estas granda fenestro al la mondo. Ĝin konservis interna bezono, entuziasmo de la uzantoj de la skribo kaj konsciintoj pri ĝia valoro.

Per la skribado ni esprimas la pensojn kaj la sentojn; per la legado ni enproprigas ilin en la tempo kaj la loko kiun ni elektas.

Skribante per la pikilo oni povas atingi rapidon de pli ol sesdek literoj en unu minuto, kaj iuj kun malpli da streĉo eĉ duoble pli. Legorapideco, tamen, estas tre diversa kaj dependas de la kapablo kaj lerteco de la leganto. Por altigi legorapidecon kaj malgrandigi la librograndecon, Braille antaŭvidas stenografian mallongigaron. La Brajla skribo ne estas tiel mistera kiel al iuj ŝajnas. Kiam ni fermas la libron, senkondiĉe per kiu skribo ni legas ĝin, la tekston ni memoras, travivas kaj enproprigas ĝian enhavon. Braille ebligis, ke la blinduloj legu pli rapide ol estis eble pere de aliaj reliefaj skriboj, skribi, korespondi kaj interŝanĝi spertojn, ekkoni homojn kaj ek trovi amikojn en personoj fizike malproksimaj.

Ankaŭ hodiaŭ, kiam ni ĉefe komunikas rete kaj per nekonjekteblaj rapidoj ni kuras tra la spaco kaj la tempo, la Brajla skribo restas nekompareble pli efika en iuj formoj de la esprimado kaj komunikado.

Ĝi donas eblecon ke ni sekvu propran ritmon, fluon de la pensoj kaj la sentoj, ke ni enproprigu la tekston, pli klare esprimiĝu.

Simpleco, senpereco kaj memstareco kiun ofertas la Brajla skribo, estas netaksebla donaco, movigpotenco por vojaĝo sen limoj.



# Originala poezio

PRINTEMPO  
(Kvar hajkoj)

\* \* \*

Vigla birdaro  
ĉi sezono novajn  
nestojn faras.

\* \* \*

Printempo alveni  
kiel varma kovrilo  
flore odoras.

\* \* \*

Ĉi terpaco de  
natura beateco milde  
animon sanigas.

\* \* \*

Ĉarme soniĝas  
korusa birdopepo  
sub domtegmento.

Jadranka Miriĉ



## ДАН

Сретни ме петком ...  
када мој живот мења подстанара  
када умире недеља у дану  
који означава умор  
када почиње ноћ  
поларног светла  
када светлим попут  
фењера у магли

Сретни ме петком...  
тада ћу моћи оћутати године  
уредно спаковане под кожу  
када одвратим сомотне ципеле  
од дневних исхода

Зови ме петком  
тада полудим од несна  
зовући тебе да уснимо

## TAGO

Renkontu min vendrede...  
kiam mia vivo ŝanĝas subluanton  
kiam mortas semajno en tago  
kiu signifas lacon  
kiam komenciĝas nokto  
de polusa lumo  
kiam mi lumas kiel  
lanterno en nebulo

Renkontu min vedrede...  
tiam mi povas trasilenti jarojn  
orde enpakitajn sub ia haŭto  
kiam deturnas velurajn ŝuojn  
de tagaj rezultoj

Voku min vendrede  
tiam mi freneziĝas pro maldormo  
vokante vin  
por ekdormi

## ТКАЧ

Ткач света  
најзад умеће боје  
бојене руком, мишљу, сновима  
Велелепни дворац боја  
неизмеран очима

Онда узима  
узле без краја  
и прекраја дуге путање  
облака  
нашим очима чунак у небо  
прекраћује низове чворова  
задатом дужином

Задњим погледом  
достижеш Моћ Целине  
Небеску шару над самим собом  
у пружи на руци  
у осмеху посред бора

Задњим погледом  
бацаш последњи прут  
којим урамљујеш Себе –  
чудесно ткање (Неба)

## TEKSANTO

Teksanto de la mondo  
finfine enmetas kolorojn  
kolorigitajn per manoj, pensoj, revoj  
Belega kolorkastelo  
senmezura por okuloj

Tiam prenas  
maŝojn senfinajn  
kaj retajladas longajn padojn  
de nuboj  
por niaj okuloj fornotubo enĉiela  
mallongigas vicojn de nodoj  
per predestinita longo

Per lasta rigardo  
vi atingas Povon de Tuto  
Ĉielan buntornamon supre de vi mem  
en sulko sur mano  
en rideto meze de faldoj

Per lasta rigardo  
vi ĵetas la lastan vergon  
per kiu vi framas vin –  
mirakla teksaĵo (Ĉiela)

## Sonĝo de kursgvidanto

Dum septembra nokto mi feliĉe dormis,  
granda foirejo estis mia kapo,  
imprestumulto kun fantazi' ŝtormis  
dum ensonĝa vojaĝ' sur mia kanapo.

En sonĝa vagado aperas la sceno:  
neniu surstrate restarigas ordon,  
trotuar' ŝtopita, ne eblas promeno,  
hontajdo premeblas nevideblan pordon.

Ĉu sindikato vendas arakidon  
aŭ eĉ promesis spektaklan koridon?  
– bruegas la voĉoj, kolere-petole,  
mi klare aŭdas, iu krias: „Ole'!“

Nu, probable homoj ne svarmas por preĝi,  
sed eble obstinas vendejon sieĝi,  
aĉeteblas ole', kafo, deterĝento,  
neniu rezistas al provizo-tento.

Fine mi estas ĝuste divenanta,  
temas ja pri nova kurso esperanta,  
kandidatamaso lavange, sen ordo,  
puŝkubutumas al societejporo.

-----  
Subite, vekhorloĝa sonorado  
skuis la kapon kiel bat' per buko,  
memorigis min pri taglaborado  
kaj min rapidigis al mia fabriko ...

El arkivo de Etelka Kiss-Jakupoviĉ

## **DETRUO**

*(Dediĉita al Serbujo okaze de bombardado 1999)*

Mi transonis malsaton dum armistico  
Laŭ atestado de ciganino  
Kun fadeno el preĝlibro  
Por flikaĵoj de Sanktaj Lokoj  
Nuda mortemulo kun folio de figujo  
Elpelis hirundojn el barilo  
Maldormado de celebranta brodaĵo

Krucumitaj, per odoro de putino  
Por sentimecaj furfuĝitaj pundomanoj  
El staplo de ĉagreno  
(Insektoj de mondo en klepsidro)  
Je rekompenco por amikado  
Nutru blasfemuloj per amara pano –  
Arameanaj leteroj sur tegolo

Forputrita bastono en pergameno  
Ĉe galopado de rampuloj  
Posedantoj de ŝuldanta herbejo  
Neelspezitaj monoj de ruiniĝo  
Kun torĉo en nefleksebla palaco  
Kaj preĝo Akatista himno  
Li lavis gambojn al lotofegoj

Epaminondas Konstandakopulos, greka esperantisto, aŭtoro de du kolektoj de originala esperanta poezio. Liaj kvin poemoj estas premiitaj en Italujo. Li laboras kiel oficisto en ministerio de kulturo de Respubliko Grekujo. Poemon preparis kaj sendis Tomislav Radisavljeviĉ.

# Tradukoј

*Деаган Колунџија*

## **КРАЈИШНИЦИ НА ОДБРАНИ МОСТОВА**

Не тражи мостове  
над мирним нашим рекама  
тамо их нећеш наћи,  
непријатељу мрачни

Подигли смо их  
изнад својих суза  
а ти их рушиш  
заједно са нашим животима

Крајишници на Панчевачком  
И на Бранковом мосту,  
У козарачком колу;

Са живима су и мртви  
у служби љубави и слободе.  
Прецизно погађа највећи курвар  
Како и куда побећи од лудака?!

Живи и мртви на мостовима у Београду  
И у Новом Саду,  
У своме Колу,  
О, пролеће  
најлепше на Сави и Дунаву,  
О, мостови,  
Увек пали,  
Пали.

Ви сте надгробни споменик палој Европи!

Београд, 20.04.1999.

*Dragan Kolunĝija*

## **LIMSOLDATOJ DEFENDAS PONTOJN**

Ne serĉu pontojn  
super niaj trankvilaj riveroj  
tie ilin vi ne trovos,  
obskura malamiko

Ni konstruis ilin  
Super de niaj larmoj  
kaj vi detruas ilin  
kune kun niaj vivoj

Limsoldatoj sur la ponto de Panĉevo  
kaj la ponto de Branko,  
en rondodanco de Kozara

kun vivaj ankaŭ mortaj  
servas al amo kaj libero.  
Precize trafadas la plej granda malĉastulo  
Kiel kaj kien forkuri de la maniulo?!

Vivaj kaj mortaj gardas fontojn en Beograd  
Kaj en Novi Sad,  
En sia Rondodanco,  
O, printempo  
La plej bela en riveroj Savo kaj Danubo,  
O, pontoj,  
ĉiam detruaj,  
ruinigaj.

Vi estas tomba monumento de devojĝinta Eŭropo.

Esperantigis: *dro M. Stojanović*

**Pesma br. 63**

Da bih ti slomio duh upotrebiću i reč i mač  
Moj govor imaće oholost  
I neće ličiti na jednu munju  
Nego na mnoštvo  
Dakle priznao sam ti da sam otpadnik  
Moje bezbožništvo stabilno stoji  
I o tome neću da govorim  
Nudim ti predstavu iz koje ćeš slušati o nebu  
O ruži što se otvara u ponoć  
O nekim očima koje zamenjuju hiljadu busola  
U nemirnoj noći  
Znam da to nije ono što želiš da čuješ  
Ali zar možeš da gledaš u oči onoga  
Koji te danas voli  
Da bi njegova mržnja  
Već sutra marširala uzdignute glave  
Na ostrvu koje ti sanjaš  
Živi pleme koje ja sanjam  
Postoji vreme koje ja sanjam  
Vreme iz mojih snova nije vreme koje nas spaja  
Nije ni dete koje će jednu ruku pružiti meni  
A jednu tebi  
U mojim snovima ti se pojavljuješ  
Kao kip okrnjenog lica  
I otkinute ruke  
Kao prah koji čeka neki vetar da ga razveje  
Kao prah svih prahova  
U tvojim snovima  
Ja sam sva ona gladna i žedna usta  
Koja čekaju svoj kraj  
I još uvek iščekuju nekakvu milost  
Na ostrvu koje ti sanjaš  
Pleme koje ja sanjam je upravo pojelo ljubav  
Koji smo oboje sanjali.

Iz zbirke *O čemu sanja cveće*, Prometej, Novi Sad, 2008.



### Poemo n-ro 63

Por rompi vian spiriton mi uzos ambaŭ: vorton kaj glavon  
Mia parolo estos orgojla  
Ĝi ne similos al ununura fulmo  
Sed al multaj  
Mi do konfesis al vi ke mi estas apostato  
Mia sendieco stabile staras  
Kaj pri tio mi ne plu parolos  
Mi ofertas vin vizion el kiu vi aŭskultos pri la ĉielo  
Pri rozo kiu malfermiĝas meznokte  
Pri okuloj kiuj anstataŭas milon da kompasoj  
Dum nokto maltrankvila  
Mi scias ke tion vi ne volas aŭskulti  
Sed ĉu vi povas rigardi en okulojn tiun  
Kiu vin hodiaŭ amas  
Sed jam morgaŭ lia malamo  
Marŝos kun kapo levita supren  
Sur insulo pri kiu vi revas  
Vivas tribo pri kiu revas mi  
Sur insulo pri kiu vi revas  
Ekzistas tempo pri kiu revas mi  
La tempo el miaj revoj nek estas tempo kiu nin ligas  
Nek ekzistas infano kiu la unu manon etendos al mi  
Kaj la duan al vi  
En miaj revoj vi aperas  
Kiel skulptaĵo kun vizaĝo duondetruita  
Kaj kun unu mano fortranĉita  
Kvazaŭ pulvo kiu atendus venton por esti forblovita  
Kvazaŭ pulvo de ĉiuj pulvoj  
En viaj revoj  
Mi estas ĉi tiuj malsataj kaj soifaj buŝoj  
Kiuj atendas la vivofinon  
Sed samtempe ankaŭ petas almozon  
Sur insulo pri kiu vi revas  
Tribo pri kiu revas mi ĵus formanĝis amon  
Pri kiu ni ambaŭ revis

Tradukis el la serba  
Zlatoje Martinov

---

\* Poemo el la poemaro *Pri kio revas floroj* konsistiganta simbolikajn 69 poemojn.  
La poemaro estas tradukota Esperanten kaj publikota dulingve far la novisada eldonejo "Prometej" kiu ankaŭ eldonis la serban version.

Dušan Vasiljev (1900-1924)

## **SE LA NOKTO...**

(Da je noć...)

Se la nokto estus tago kaj la tago estus nokto, mi komuniĝus kaj forgesus Vin. Sed Vi estas pli forta ol mi.

Mi estas multe forta.

Mi estas pli forta ol la Morto, ĉar mi ne timas ĝin, kaj pli forta ol la Vivo, ĉar ĉiumomente mi povas forlasi ĝin. Mi estas pli forta ol la Tago, ĉar mi scias ke ĝin postsekvos nokto, kaj pli forta ol la Nokto, ĉar mi scias ke ĝin venkos la Suno.

Vi estas pli forta eĉ ol mi.

Kun rideto Vi forpuŝis mian ŝipon al la akvoj, kie ĝi ankoraŭ nuntempe luktas kun la ondoj, kaj mi ne havas forton por turni ĝin.

Miaj okuloj estas respegulo de la Viaj. Ili ploras kiam Vi ploras, kaj ridas kiam Vi ridas. Kaj kvankam mi rezignis al Vi, Via kanto estas por mi kanto de l' Amo kaj Vivo.

Lasu momente Viajn pupojn kaj tralegu ĉi tiun libreton. Ĝi estas:

Via, al Vi kaj por Vi.

Poste ekludu tiun kanton, kiun mi ellernis de Vi.

Kaj deŝiru unu folion el via memorlibro.

*Esperantigis Boriša Milićević*

**Simo Matavulj (1852-1908)**

**BAKONJA FRAT'-BRNE  
(Bakonja fra-Brne)**

Tradukis en Esperanton Boriša Milićević

(Oka parto)

-Ni donos al li eĉ du florenerojn! diris Onklino.

-Eĉ tri! aldonis iu.

-Eĉ ses!... ses durajn florenerojn! diris Koleremulo.

-Aŭdu! Ses durajn florenerojn! Ek! saltu! – kaj oni forpuŝetis lin antaŭ la porjunulan kuirejon, kien la servistoj elrulis unu barelegon, priksimume dekkvinsitelan, kaj enirigis lin en ĝin.

-Dooo: salt! ekkriis Dundak.

Kruĉegulo eligis la kapon.

-Malsupren! Malsupren! kriis ĉiuj. Kaŭriĝu kaj: salt!

-Mi ion dirus! ekbruis Kruĉegulo en la barelego.

-Nu diru! Kion:?

-Mi diru, se mi rompos krurojn...

-Diablo vin forigu! ekkriegis Koleremulo. Se vi jam estas tie, eĉ se vi ambaŭ krurojn rompus. Nu: salt!...

Kruĉegulo sensvingiĝe elflugis kaj ekstaris antaŭ ili..

-Brave! kriis la monakejestro klakante la unua permane. Ĉiuj aplaŭdis kaj tuj donis al li monon.

Posttagmeze ankaŭ la lernantoj maskvestiĝis kaj kune kun la servistoj frenezadis ĝis la sunsubiro, post kio ili lavis sin kaj alivestiĝis, poste ĉiuj ekiris la preĝejon al la indulgo-preĝo. El la preĝejo la servistoj ekiris al la malnova porjunula kuirejo, kie Ekskrementulo estis preparinta al ili grasan vespermanĝon kaj abundan vinon. Tiel okazadis tri-kvarfoje jare. -Iom poste, venis la pastroj kaj lernantoj, kaj sidiĝis aparte post la ŝtonapogilon.

Boban tostis al la monakejestro.

Bujas, iomete gaja, instigis Kruĉegulon ke ankaŭ li tostu.

Bukovica-ano kun la sangecaj okuloj, ŝanceliĝante, ektostis, senkomence kaj senfine, kiel nur li scipovis.

La monakoj ridegis.

Tiel daŭris ĝis la noktomezo, kiam estis ende ke la sonoriloj eksonoru, kio signifis ke la granda fasto komenciĝas.

La servistoj, svingiĝante, ekiris kaj kunportis Kruĉegulon, ĉar li jam estis senkonscia.

Ekskrementulo forakompanis ilin kaj ŝlosis la pordon de la monakejo, poste ĉio eksilentis...

La kapo de Korpulentulo bruadis kiam li vekigis. Komencis tagiĝi. La ĉielo kovriĝis per taj nuboj; de ĉe la maro blovis forta sudvento. Korpulentulo, pezvola, staris iom en la vestiblo, poste ekfrapis al la monakejstra pordo por ricevi la kortan ŝlosilon, kaj tra ventego, li alvenis antaŭ la preĝejon kaj sonorigis la vekilon, duoble pli longe ol kutime, kiel je la unua tago de la granda fasto. De tie li foriris al la fontano, kie li sidiĝis, kaj kovris la vizaĝon per la manoj, parolante:

-Dio, kaj sankta Frane, indulgu miajn *malkonformaĵojn!* (Tiun ĉi vorton li ellernis en la monakejo). Donu al mi tempon por ke mi pentofaru, ke mi fariĝu bona diakono!... Kaj se la Frat' ekscios ĉion kaj elpelos min, mi dronigos min, nur hejmen mi ne volas, kreu al mi, mia bela sankta Frane!... Kaj vi scias kiu instigis min vagadi dumnokte, rigardadi kiel oni viajn penfruktojn ŝteladas! Mi mem ĝuste neniam venus al tiu ideo, neniam!... Do, indulgu, Dio kaj sankta Frane, min pekulon!...

Se li estus potenĉava, ĉiukaze li ne indulgus tiuhore siajn kamaradojn, nek la servistojn (escepte de Kruĉegulo), sed li ĉiujn volonte dronigus en la riveron, kaj plej volonte Trtak-on kaj Boban-on. Evidentiĝis al li ankaŭ Stefano, iam kara Stefano, kaj nun pli nigra ol diablo, ĉar tiu freneza Kotor-ano estis iniciatinto de ĉiu "malkonformaĵo". Poste li ekpensis pri ĉio kion li ĝisvivis kaj ekkomparis tion kion li iam pensis pri la monakej-anaro kun tio kion li nun scias...

Kelkaj pluvgutoj falis sur liajn manojn, pro kio li skuiĝis el la revado kaj ekrigardis al oriento, kie la suno ekbrilis tra la nuboj. Li ekrigardis ĉien ĉirkaŭ, kaj ekŝajnis al li, ke montetoj kaj trunkoj kaj ŝtonegoj, kaj ĉiuj vidaĵoj antaŭ liaj okuloj, estas kvazaŭ enpenŝiĝintaj kaj seriozaj, kvazaŭ la tuta naturo estus sentanta ke komenciĝis la granda fasto, tempo de pentado kaj grandaj kaj gravaj preĝoj. Korpulentulo, ekscitita, kruccsignis kaj kliniĝis al la Suno, poste lertpaŝe revenis, pensante pri la belaj preĝejaj fastoservoj, imagante sin mem kantonta dum la antaŭpaska dimanĉo "Sinjoran suferon" same kiel pasintjare, dum la printempa parfumo estis alfluonta de ekstere. La transriveruloj denove demandas: "Ĉu tio estas la juna Jerkoviĉ, tiel bele kantanta?!..."

La harplektaĵo de Korpulentulo estis ŝvelanta je tiu ekpenso, kaj li tiel bonhumoriĝis, ke li de malproksime salute alparolis al Dudak, kiu nudeca eliris antaŭ la porjunulan kuirejon...

Ĉu estus bone, ke mi foriru tien por veki ilin ĉiujn? Tio estus la unua utilaĵo kiun mi ĉi-matene povus fari al la monakejo! Jen mi foriru!

Korpulentulo lasis la kruĉon kaj forkuris antaŭ la porjunulan kuirejon.

-Forĝisto! Muelisto! Leviĝu! La Suno ekbrilis! Strabulo, leviĝu kaj veku Kruĉegulon!

La servistoj murmuris ion interne. Revenante, Korpulentulo vigle rememoris la hieraŭan kuradon kaj salton de Kruĉegulo.

-Ne ekzistas viroj, fraĉjo, kiel Bukovica-anoj! komencis li interparoli kun si mem. Ĉi-konfuzulo, li estas meztaŭga, kaj kion li kapablas fari! Kaj kiuj estus tiuj kiujn oni elektus... Salti el la barelego estas tro multe!... Kaj Kruĉegulo diras ke ilia forĝisto povas rompi per la manoj ĉevalan hufieron!... Ĉu tiuj Bukovica-anoj estas ja drakonoj? Ĝuste ili estas, fraĉjo! Nu ankaŭ mi saltos sur ĉevalon, eĉ se mi ambaŭ krurojn rompus!

Korpulentulo haltis antaŭ la kruĉo, kaj imagas sin kuranta paralele kun ĉevalo, kaj subite salt' sur ĝin. Tio okazas je "kermeso" (je la monakeja festo) antaŭ la popolamaso, kiu aplaŭdas lin permane. Poste Korpulentulo ordonas ke oni elrulu du grandajn barelegojn, ambaŭ pli altajn ol viro, post kio li eniras en unu, kaj el ĝi saltas en la alian. Tiam la amaso ĝuste ekfrenezumis, ĉar la dalmatojn multe ravadas tiaj aferoj!...

Post kiam Korpulentulo kurbiĝis je la kruĉo, lia rigardo direktiĝis al la ĉevalejo, kaj li vidis ke la pordo estis malfermita. Li relasis la kruĉon, kaj forgesinte pri la onklo, ekkuregis tien. Tiumomente ekpluvis. Korpulentulo puŝis la pordon kaj de sur la sojlo komencis karesparoli:

-Kujas! kie vi estas, mia kujas (flavĉevaleto)! ĉar Ila ĉevalo rekonadis lian voĉon, kaj ĉiam respondadis per henado. Sed la flavĉevalo ne hensignis. Korpulentulo eniris kaj vidis... vidis nek la flavĉevalon, nek la nazblankulon de Koleremulo, nek la brunrufulon de Betulo, nek la nigrulon de Vostvolvulo, nek du plej bonajn ŝarĝoĉevalojn.

-Kie ja ili estas? demandis Korpulentulo. Tiuj du ĉavalaĉoj, mordantaj el la fojnujo ekrigardis lin malbonvole, poste turnis la kapojn for de li, kvazaŭ volonte diri: "Nin ne demandu!". Korpulentulo, kvazaŭ senspira, forkuris al la porjunula kuirejo.

-Kie estas Kruĉegulo? demandis li.

-Li, fraĉjo, endormiĝis, kaj bezonas abkoraŭ konsiderindan tempon por atingi la sonĝfinon! diris Dundak sidante sursojle.

Korpulentulo ekkriegis, tiel ke en ĉies oreloj ektintis:

-Ne estas ŝercinde, ve-mateno al vi!... Tuj eliru, malaperis la ĉevaloj!... Ĉu vi komprenas?... La ĉevalejo estas malfermita, kaj la ĉevaloj malestas!

Ĉiuj postkuris lin.

La ĉevaloj malestas, sed la seruro ne estas rompita.

-Vi, Strabulo, forgesis ŝlosi hieraŭ vespere! diris la forĝisto.

-Ne mi, sed Kruĉegulo forgesis...

-Silentu, bestaĉo! ekkriis la forĝisto. "Kruĉegulo forgesis!" Ĉu ja ni ne kunportis lin hieraŭ vespere kvazaŭ mortan?... Sed mi opinias ke ne estas malbono.

La ĉevaloj, estis neligitaj, kaj la pordo estis malfermita, sekve ili ekiris al la rivero. Ni iru laŭspure!...

La grundo estis malseka, pro kio la spuroj klare rekoneblis, sed inter la ĉevalaj hufspuroj estis ankaŭ la homaj piedspuroj. La spuroj kondukis al la rivero, sed ekde la rivero ili ekzistis nek maldekstre nek dekstre.

Ĉiuj konsterniĝis pro miro.

-Nu kio estas tio? demandis Korpulentulo.

-Je mia animo, ili dronis! komencis Dundak frotante la ruĝiĝintajn okulojn. La vivo fintedis la ĉevalojn, kaj ili konkorde kaj interkonsente diris: "Ni dronu!" Kaj la diritan ili plenumis, kiel vi jen vidas...

-Vi ŝercas kiam ne estas ŝercinde!...

Dundak ekridis kaj respondis:

-Kion alian mi faru, kiam vi volas stulte babili? Vi bele vidas la ĉevalajn spurojn, sed vi ankaŭ vidas la nudpiedajn postsignojn de transriveruloj, kaj vi krome vidas la bovajn ungegspurojn...

-Jes, pro Jesuo! diris la bovisto. Jen ankaŭ la bovaj spuroj!... Ve al mi, ili forkondukis ankaŭ bovinojn! kaj li forkuris al la tegmentaĵo, kaj la ceteraj post lin.

Tuj post kiam estinte antaŭ la pordo, la bovisto turnis sin al ili kaj disetendis la manojn. Ĉiuj aliregis. La pordo estis derompita. Ĉiuj kune eniris. La bovinoj malestas.

Ve al mi, ili malestas! diris la bovisto.

Dundak komencis:

- "Donu al mi kafon kun lakto!" –Lakto ne ekzistas, siĉjo!... "Kaj kial lakto ne ekzistas?" Tial ke la transriveruloj forkondukis la bovinojn, siĉjo!... "Kaj kial ili forkondukis tiujn?"

-Pro tio ke ili ne havas la siajn, siĉjo!...

La kamaradoj iomete ridis, dum Korpulentulo, pala, rigardpafis ilin kaj ekriproĉis ilin.

-Vi ja estas servantoj de la sankta Frane!... Kaj vi estas honestaj kristanoj!...

-Malrapide, junulo! abruptiĝis al li la muelisto. Vi ankoraŭ ne rangiĝis por ordonadi kaj kolerkriaĉi, sed sekvu viajn aferojn!...

Poste la muelisto rapide eliregis, kriante kiom gorĝpove:

-Ek surpieden!... Kaj je la sankta Frane kaj liaj suferoj, oni forŝtelis la monakejon!... Al helpo! Al heel-poo! Alvenu, ĉi tien, al heel-poo!

-Sonorigu, sonorigu! kaj pafu! kriis la forĝisto. Al heel-poo!

La triopo alkroĝiĝis al la ŝnuroj, kaj ekskuis ĉiujn kvar sonorilojn; la ceteraj kaptis armilojn el la porjunula kuirejo, kaj oftigiĝis la pafado kvazaŭ la regiono ribeliĝus.

Senĉese pluvis.

Ĉiuj eliregis el la monakejo. Frat'-Brne, sen sutano, kovrita per la surtuto. Koleremulo alkuris la unua.

-Kio okazas?...

Tuj postkiam kompreninte kio okazis, li ekiregis al la rivero, la servistoj post lin, la lernantoj post la servistojn kaj la ceteraj monakoj malrapide post ilin.

-Iu dronis! pensis Funelo.

-Ti-i-el! Nu kion ni faru al li?!

-Sed, eble estas ankaŭ io alia! diris Onklino.

Vidinte ke la spuroj pluen ne kondukas, Koleremulo ekiris laŭrivero al la bestflogo. Ĉiuj aliaj laŭvice post lin. Korpulentulo tuj post Koleremulon. Kiam ili atingis malsupron de la salikvergaro, forestis kaj la bestflogo kaj la ŝipo.

Dundak ekfajfis kaj mansvingis.

-Kion vi opinias, Dundak? demandis lin Koleremulo.

-Mi opinias ke ili dronigis tiujn se havinte tempon... aŭ lasis ilin naĝi laŭ la rivero.

-Kaj ili ne estus povintaj alkroĉiĝi al io?

-Eĉ tio povus esti, ĉar akvo ne estas altnivela.

-Tion ni unue viidu! diris Koleremulo, kaj reiris la saman vojon. Ĝu oni forkondukis ĉiujn ĉevalojn? demandis li Korpulentulon.

-Ne... restis du ŝarĝoĉevaloj!  
 Iru... falketo... vi estas la plej rapida... ekiru kaj alkonduku... ilin.  
 Korpulentulo flugkuris. Vane la onklo, kiu kun la ceteraj atendis  
 amason, haltinstigis lin.

-Kio estas, pro Dio! oni demandis Koleremulon.  
 -Kiel kio estas? kriis kolere Koleremulo. Ĉu vi ankoraŭ ne scias ke  
 oni nin  
 ŝtelis!...

Tiam Korpulentulo alkondukis la ĉevalojn.  
 Koleremulo ekrajdis pli bonan kaj spronantis ĝin en la riveron.  
 -Batu ĝin! kriis Koleremulo.  
 -Ne en akvon, pro Dio! Diablo portu la finportitan, kaj vi gardu vin!  
 petis la monakejestro.

-Batu ĝin, kiam mi diras, kaj postiru min kiu volas! kriis Koleremulo.  
 Korpulentulo piedbatis la ĉevalon, kiu ekvadis, kaj iom post iom  
 kuraĝiĝis kaj eknaĝis. Akvo portis ĝin transversen. Koleremulo svingadis  
 la manojn kaj, kalkan-  
 spronante ĝin transnaĝis.

La transriveruloj alvenis kaj ĉiuj samtempe ekbruis, same kiel la  
 monakejanaro de la alia riverflanko, tiel ke ili estis brusufokantaj unuj la  
 aliajn. En tiu  
 granda konfuzo, Korpulentulo ekrajdis la alian ĉevalon kaj enirigis ĝin en  
 akvon.

Korpulentulo-ĉevalo dufoje dronis, tiel ke nur la kapo de la knabo  
 restis superakva. Iĝis granda tumulto.

-Savu la knabon!... Kiu estas naĝanto?... Savu la knabon!... kriadis  
 frat'-Brne.

Korpulentulo kapskuadis ke la helpo ne necesas, kaj post tio li  
 malstreĉis la  
 kolbridon, kaj malantaŭeniĝis sur la ĉevalpugojn.

Koleremulo kaj Korpulentulo ekiris laŭlonge de la rivero antaŭ la  
 vilaĝanoj.

-Nun iru vi ĉiuj al la pramo por helpi se oni alveturigis la flosan!  
 ordonis la  
 monakejestro.

-Kie ja estas Kruĉegulo! demandis Onklino.  
 -Kiu ja scias! Li hieraŭ vespere ebriiĝis, kaj verŝajne ankoraŭ  
 dormas! respondis iu.  
 -Nu voku ankaŭ lin, ĉar li povus taŭri same kiom vi tri.



La servistoj ekiris tien laŭordone, kaj la monakoj kaj lernantoj direkte al la monakejo.

-Iru vi malfermi la preĝejon, ĉar ne ekzistas kialo ke la diservo ne okazu ĉi-matene! diris Balgo al la lernantoj.

-Tio ĉi ne povis okazi sen la eldoma perfido! Oni vidas ke tion ĉi kaŭzis la eldoma fingro! komencis la monakejestro spirblovante.

-Ankaŭ mi tuj ekpensis tion! Ankaŭ mi tuj suspektis, ĉu vi ja scias kiun?

-Kiun?

-Stefanon, ĝuste, diris Balgo.

-Tion vi pravas! ekkriis ĉiuj.

-Kaj kion vi opinias, Brne? demandis lin Vostvolvulo.

-Mi opinias ke diablo forportis de mi ducent talerojn, jen kion mi opinias!

Kaj kio ja helpas al mi se oni ekscias kiu kulpas? La ĉevalon mi ne plu vidas, ĉar ĝi estas ĝis nun je la turka limo...

-Tiel estas, je mia fido! respondis la monakejestro. Kvar rajdĉevalojn kalkulu po ducent talerojn kun la rajdilaro; poste du ŝarĝoĉevalojn taksu po kvindek, tio sumas naŭcent talerojn; poste ses bovinojn ni taksu ne pli ol po dudek, tio estas cent sesdek. Nu, aldonu nun du ŝipetojn kaj la bestfloson, ni diru denove centon da taleroj – do dekdu centoj estas forkaptitaj ĉi-matene je la fastunua merkredo!

-Ĝuste tiel!... Jen, tiel estas! Tiel ja la transriveruloj fortimis Kaŭrulon.

Virvulpo revenis.

-Jerkoviĉ kunportis la ŝlosilon!

-Ho jen! diris la monakejestro... Iru en la forĝejon kaj alportu nepraĵojn por ke ni perforte malfermu la malgrandan pordon.

Frat'-Brne, pretenante la ventron, kun la ĵus malsekiiĝintaj okuloj, diris:

-Mi, fraĉjoj, ne plu povas! Penpene mi ĝis ĉi tie venis. Mia ventro bruas, kvazaŭ brasiko bolsvarmus! kaj li malrapide eksupreniris ŝtupare en sian ĉelon.

Lin postiris Balgo.

Ĝuste tiam revenis Virvulpo kun la ilaro, kaj li, Virkato kaj Bujas komencis derompi la malgrandan pordon.

La monakoj promenis ĉirkaŭ la korton.

-Eldoma, eldoma kaj eldoma perfido, alie ne povas esti! diris Onklino. Pripensu nur ĉi tion: la ŝtelistoj povis scii ĉion kio ĉe ni okazis hieraŭ vespere; ili sciis ke la servistoj restas ĝis malfrue en la monakejo, same kiel ĉiujare je tiu tago; ili sciis...

-Ne necesas ĉion ĉi elnomadi! interrompis lin Vostvolvulo. Tio povis okazi eĉ sen la eldoma perfido, ĉar kiomo da vaguloj servadis ĉe ni, kaj poste disigis ĉien siajn spurojn! Krome, la jaro estas malsathava, kaj la popolo koruptiĝis!

-Mi denove la samon: tie ĉi estas enmiksita Stefan-mano! diris Betulo. Mi aŭdis ke Stefano poste servadis la monakojn.

-Nu atendu ke mi finu, diris Onklino. Ne interrompadu min, vi havos tempon por ke ĉiu diru sian opinion!... Mi ne diras ke Stefano ne enmiksiĝis aŭ jes, aŭ ke tio povus esti Petro, kaj ne Paŭlo! Mi nur volis diri ke la ŝtelintoj ne povis forpeli la brutojn dum la lunluma nokto tra niajn parokojn, inter niajn farmulojn, tion ili ne povis fari sen helpmano el nia domo! Kaj dirante "eldoma mano", mi ne pensas pri tiuj ĉi niaj kvin-ses servistoj, sed pensas ankaŭ pri la plej proksimaj transriveruloj!... KREDU al mi ke inter tiuj, nun postkurantaj frat'-Jakobon laŭrivere, estas sufiĉe da tiuj ridantaj nun subliphare... Centfoje mi diris al vi: ili estas pli malbonaj ol la ortodoksulaĉoj!

-Ne diru tiel, fraĉjo! diris Vostvolvulo.

-Kiel ja ili ne estas pli malbonaj? La ortodoksulaĉoj almenaŭ malkaŝe parolas:

"ŝtelpunu Bunjevo-anojn! Ne bedaŭru Bunjevo-aĵojn". Tiel ili almenaŭ parolas, kaj almenaŭ klaras koncerne ilin! Dume, niaj rustuloj, menciante la nomon de la sankta Frane, sentimentaliĝas, kvazaŭe, pro la pieco, kaj aliflanke, kion ajn poveble, ili forkaptas de ni, eĉ haŭtojn ili forigus al ni... Ekde pasintjare ili kvazaŭ estis timiĝintaj pri Kaŭrulvampiriĝo, por pli facile forrabi nin kiam ni estos tion malplej esperantaj!...

Kaj kio plejparte certigas mian suspekton ke ankaŭ la servistoj interkonsentis kun la ŝtelintoj, ili hieraŭ vespere instigis Kruĉegulon por drinki. Ili timis ke Kruĉegulo leviĝados dumnokte! Ĉar, vidu, kia ajn li estu, mi tamen plej multe fidus lin.

Mi ankaŭ! diris Betulo.

Mi ankaŭ! certigis Vostvolvulo.

-Mi fartas malbone! diris la monakejestro, kies vizaĝo ruĝiĝis, kaj la kolvejoj ŝveliĝis.

-Nu vere, kio okazas al vi? demandis Onklino. Mi ekde ĵus antaŭe...

-Mi fartas malbone, fraĉjo! Miaj tempioj batas kvazaŭ martelego, mi ardegas, kaj kvazaŭ formikoj rampus sur miaj dekstraj femuro kaj brako...

-Nu iru por kuŝi, fraĉjo! diris Onklino.

-Iru, iru! diris ankaŭ la ceteraj.

Tiumomente leviĝis tumulto el la preĝejo. La lernantoj derompis la pordon kaj eniris.

-Kia diablo denove? Kio povas esti denove? diris ili ekirinte al la preĝejo.

Virkato, Bujas kaj Virvulpo renkontis ilin, ĉiu pala kaj tremanta.

-Oni forrabis la preĝejon, religiuloj!

-Oni forrabis la preĝejon!

La monakoj kaj lernantoj ekkuris kun ili, sed la monakejestro haltis, ŝanceliĝis kaj falis malantaŭen, kvazaŭ kandelo.

\*\*\*\*\*

*(daŭrigota)*

# Memoroj

## „Seksi” vespermanĝo

Dum pluraj jaroj en E-societo en Zemun kunvenoj okazadis ĵaŭde de la 18-a ĝis la 20-a horo. Pro interesa programo ofte oni restadis eĉ pli longe.

En la jaro 1970 beograda televido komencis ĝuste ĵaŭde ja la 20-a horo elsendi serion „Sagao pri Forsajtoj“, kiu estis tre interesa kaj ĉiuj urĝis iri hejmen, vespermanĝi kaj trankvile spekti la elsendon.

Por ke ni en la societejo restu kune pli longe, samideano Branko Rajšić (unu el fondintoj de la societo) venis al ideo, ke oni vespermanĝu en la societejo kaj tuj promesis, ke li la sekvontan ĵaŭdon alportos manĝaĵon. Oni kaptis la okazon, ĉar multaj societanoj estis studentoj kaj ĉiam estis gaje resti pli longe.

Mi menciis, ke la societejo estis larĝa kun multaj novaj verdaj tabloj kaj seĝoj. Ekzistis ankaŭ unu malgranda aparta ejo kun krano. La ejon oni uzis kiel kuirejon. Tie oni povis ankaŭ lavi la manojn.

Do, komenciĝis la postprograma „restoracia“ programo. Samideano Rajšić alportis modestan vespermanĝon: fromaĝon, grivojn, salaton. La sekvontan ĵaŭdon li aldonis kolbasojn kaj kukojn. Poste ni, kiuj havis sian dommastrumadon, montris siajn kuirlertecojn kaj alportadis specialaĵojn. Tiel la societaj kunvenoj fariĝis gastronomiaj ĝuoj.

Unu fojon iu menciis, ke ni povus anonci en gazetoj, ke, se oni volas senpage bone vespermanĝi, oni venu al E-societejo en Zamun. Sed iu aldonis: „Ne zorgu, tian anoncon neniu rimarkos, se ĝi ne entenas vorton 'seksi' aŭ foton de sufiĉe nuda fraŭlino.“ Tiam samideano Rajšić informis nin, ke li la sekvontan ĵaŭdon organizos „seksi“ vespermanĝon. Ni miris, sed li nenion pluan diris.

La sekvantan ĵaŭdon oni, enirante en la societejon, povis rimarki grandan ŝanĝon: la tabloj estis kunmetitaj, kovritaj per blankaj tablotukoj kaj sur ili estis veraj restoraciaj teleroj (prunteprenitaj el konata loka hotelo), glasoj ktp. Ĉio estis dece aranĝita. Sur la forno estis granda poto, el kiu elvaporigadis io. Ĉirkaŭ la forno staris tri ĉarmaj sinjorinoj (edzino kaj du fratinoj de s-ano Rajšić) havantaj blankajn antaŭtukojn kaj ornamaĵojn el blanka tolaĵo kaj puntaĵo surkape. Ili miksis tion, kio estis en la poto.

Kiam oni eksidis, ĉiu ricevis menuon kaj devis pagi po unu dinaron (tiam bagatela sumo). La rozkoloran menuon mi gardas ĝis hodiaŭ. Ĝi aspektas jene:

Speciala kunveno de  
ESPERANTO-SOCIETO ZEMUN  
Matije Gupca 27

„SEKSI“-VESPERMANĜO

Menua karto la 5.III.1970

Nuda supo (tute nuda) prezo 1 n.d.

Bovinaj mamoj kun kreno aŭ mustardo

Kokina gambo senplumigita, garnita per terpomkroketoj

Anas-postaĵo farĉita per kokinaj ovoj, kun celeria aŭ terpoma salato

Virbovaj testikoj a la Milanese

Nudaj porkinaj piedetoj en ĵeleo

Pomtranĉaĵoj en aŭ sen ĉemizo

Nudaj virinoj afranke sur salutletero al niaj amikoj.

Tiam alvenis la tri sinjorinoj kun metalaj taso el kiuj kelneroj kutimas verŝi supon en teleron. Sed, ve! Ni ricevis fakte nudan supon, ĉar ĝi estis pura varma akvo, la nura „manĝaĵo“, kiun ni pagis. Aliaj manĝaĵoj estis senpagaj, bele kaj „seksi“-aranĝitaj, tre bonkvalitaj kaj bongustaj. Samideano Rajšić estis konata en urbo Zemun kaj viandovendistoj helpis al li elekti bonkvalitan viandon kaj aliajn materialojn (ekzemple la bovinajn mamojn, kiuj panerumitaj estis delikatesaj)

Tiel „seksi“-vespermanĝo bonege sukcesis kaj ni trapasis la tempon en bona kaj bonhumora atmosfero.

Etelka Kiss-Jakupović

# Recenzoj

## ANSTATAŬ RECENZO



Komence de decembro aperis serba traduko de libro de A. Korĵenkov "Historio de Esperanto". La libron tradukis membroj de beograda E-societo "Radomir Klajić" kaj mone subtenis ĝian aperon. Mi ne skribis recenzon pri tiu libro, sed mi tradukis Antaŭparolon por la serba eldono (la antaŭparolon skribis s-ano Dimitrije Janičić).

### ***Antaŭparolo por la serba eldono***

Historio de Esperanto-movado ĝis nun ne aperis serblingve. Esperanto, lingvo, kiun fine de la 19-a jarcento kreis Lazaro Ludoviko Zamenhof, pola kuracisto, havis, ankoraŭ nun havas kaj, espereble,

havas multajn adeptojn en Serbio. Eĉ en la adresaro de la inciatinto de Esperanto troviĝas kelkaj adresoj de homoj el Serbio.

Aperigo de la libro de Aleksandro Korĵenkov, fama rusa esperantisto kaj redaktoro de gazeto "La ondo de Esperanto" instigis grupon de esperantistoj, membroj de E-societo "Radomir Klajić" el Beogrado, kadre de siaj regulaj aktivecoj organizi tradukadon de tiu interesa kaj dokumentita libro. Ni ricevis afablan permeson de la aŭtoro traduki la libron en la serban lingvon. La laboron transprenis deko da membroj de la societo. Diversaj niveloj de kono de la objekto kaj la lingvo, kompreneble, kaŭzis diferencojn en la kvalito de la traduko, egalformeco de la terminologio kaj de la libro, kiu estas verko de unu aŭtoro, pro kio la ĉefredaktoro kaj inciatinto, d-ro Pribislav Marinković faris la unuan lektoradon de la libro kaj poste la kompletan materialon lektoris kaj egaligis Adem Jakupović. Dank' al lia peno, la libro, kvankam tradukita de multaj tradukantoj, efikas kiel unueca verko, kion ni deziris.

Ni pripensis la eblecon plilarĝigi la libron per mallonga historio de Esperanto-movado en Serbio. Tamen, ni opiniis, ke la intenco de la libro kaj havebla spaco ne permesus eĉ parte plenumi nian deziron prezenti historian disvolviĝon de la Esperanto-movado en Serbio. Tio povas, kaj devas, esti temo de aparta libro, kiun, similmaniere, povus realigi esperantistoj, precipe membroj de la serba Instituto de Esperanto. Tio, samtiel, estus bona okazo por pli larĝa esploro kaj celita engaĝo de multnombraj serbaj esperantistoj.

Per aperigo de ĉi tiu libro Esperanto-movado en Serbio festas du gravajn datrevenojn: en Kragujevac estis en 1908 publikigita la unua lernolibro de Esperanto (la aŭtoro estas Jovan Jovanović, instruisto kaj posta urbestro de Kragujevac) kaj en 1909 en Beogrado estis fondita la unua Esperanto-societo, kies tradiciojn hodiaŭ daŭrigas Esperanto-societo “Radomir Klajić”.

Adem Jakupović



# Informoj

Kunveno de ES "Radomir Klajić" la 26-an de januaro 2009

## **NAŬDEK JAROJ DE NIA AGNESA**

(El parolo de D. Janičić)

La hodiaŭan tagon, la 26an de januaro, finiĝas naŭdek jaroj de la tago kiam nia kara kaj estimata samideanino Agnesa Eremija vidis unuafoje ĉi tiun nian mondon. Hodiaŭ, ni kunvenis por ke ni salutu ŝin okaze de ŝia naŭdeka naskiĝtago, por ke ni deziru al ŝi ankoraŭ aktivajn jarojn, sanon kaj laboron. Ni kunvenas ankaŭ por rememorigi ŝian, laŭ mia opinio, grandan kontribuadon al la Esperanto-movado de nia patrujo, nia urbo, kaj nia kulturo.

Mi ne deziras paroli al vi pri ŝia vivvojo – studado en Novi Sad, laboro en korespondejo de Tanjug kaj diplomatia reprezentaro en Budapeŝto, pri ŝia laboro kiel tradukistino kaj anoncistino por la hungara lingvo en Radio-Beograd, Radio Jugoslavio, pri vivmalfacilaĵoj kiuj akompanis ŝin sur ĉi tiu estiminda vivovojo, nek pri ŝia kariero de mezlerneja profesorino en beogradaj mezlernejoj.

Mi deziras paroli nur pri ŝiaj tradukistaj kaj esperantaj verkoj kiuj prezentas kontribuadon al esperanta kaj kultura vivo de nia lando kaj de nia movado. Krom Ordenon de laboro kun arĝenta girlando (1974) ŝi ricevis du tre validajn esperantajn rekonojn: Trian premion en internacia konkurso de Subotica Esperanto-societo „La kolektanto de ĉielarkoj“ (1991) kaj la unuan premion en la literatura konkurso pri traduko de parto el „Enciklopedio de mortintoj“ de Danilo Kiŝ (2001). Apartan diplomon por meritoj donis al ŝi Jugoslavia Esperanto-Ligo (1984) kaj Diplomon de la loka komunumo Palilula, kie ŝi loĝas.

La unuan esperantan ekzamenon ŝi faris en la jaro 1982, antaŭ la komisiono kies membroj estis Momĉilo Ŝaponjiĉ, Greta Ŝtol kaj Antonije Sekelj, kaj jam en la jaro 1984 ŝi akiris diplomon B.

Ŝi ne ĉesis la tradukistan laboron. Krom tekston de Danilo Kiŝ „Gloras morti por la patrujo“ ŝi tradukis al Esperanto popolajn poemojn de Kosova ciklo kaj tekston surskribitan sur la monumento de kosovaj herooj. Poste ŝi tradukis tekstojn de Bora Stankoviĉ, Ivo Andriĉ, Dobrica Ĉosiĉ, Eva Ras, Vojislav Iliĉ, Jovan Duĉiĉ, Desanka Maksimoviĉ, Ljubivoje Rŝumoviĉ kaj de la hungaraj poetoj Endre Andi kaj Atila Joĵef. Multaj el ĉi tiuj tradukoj aperadis en niaj revuoj.

La ideo de L. L. Zamenhof altiris ŝin. Tio estas kompreneble ĉar ŝi naskiĝis en Rumanio, ĉar ŝi estas judino, studis en Novi Sad, parolas la hungaran, germanan, ĉar ŝi estas profesoro de franca kaj germana



lingvoj en ŝtato kie oficiala lingvo estas la serba. Tio signifas ke ŝi frue povis ekscii la avantaĝojn kaj kvalitojn de la ideo pri facila, logika internacia lingvo, ideo pri komprenemo inter homoj kio ne estas ebla sen lingva egalrajteco, kaj ŝi komprenis, kiel multaj aliaj, ke tiu ideo estus farita nur helpe de internacia lingvo Esperanto.

Dum la jaro 2004 aperis du libroj de ŝiaj tradukoj: traduko en la serba poemoj kaj prozo de Hajnrĥ Hajne (Heinrich Heine) laŭ ŝia elekto kaj poste "Interparolo en la frukt-ĝardeno" la 5-an de aŭgusto, traduko de la libro de la konata pola verkisto Igor Neverli kiun esperantigis ŝia pola amikino Zofia Fornalova. Mi citas s-ron Jovica Aĉin, recenzinto de tiu libro kiu aperis en eldonejo „Multimedia press“: „Temas pri du tradukistaj amoj: kiel laŭ ĉi tiu altvalora dokumento pri Korĉak el la plumo de la konata kaj legata pola verkisto Igor Neverli, tiel al Esperanto (al kiu kaj el kiu la libro estis tradukita), lingvo farita por esti internacia kanalo de komunikado inter homoj kaj kiu ankoraŭ hodiaŭ forte daŭras kiel garantiaĵo de pasio kaj espero. Tiu garantio ĉi foje sian belan lokon trovis en la animo de Agnesa Eremija.“

La filo de Igor Neverli permesis al sinjorino Agnesa ke ŝi neprofitcele traduku *Interparolon en frukt-ĝardeno*. Per tio (kaj per aperado, kompreneble) ŝi donis netakseblan kontribuon por ekkono de granda humanisto, kuracisto kaj pedagogo Januŝ Korĉak, ĉar ĉi tiu libro per interesa kaj bone dokumentita maniero ebligas enrigardon en la Korĉakan aktivadon de protekto de infanoj sen gepatroj, aparte judaj infanoj kiujn li ne volas forlasi, li mem kun ili foriris en gasan kameron. Pri ĉi tiu traduko mi aperigis tekstojn en reto kaj en „Izraela esperantisto“.

La traduko de la libro *Malsimplaj pasintaj tempoj* de la franca verkistino Ĵanin Elkubi estas rakonto pri tempo de inkvizicio kaj ekzilado de judoj el Portugalio. Ĵanin Ekubi, profesorino de klasika literaturo en Strazburo estas ankaŭ tre konata kiel aktivulino en monda juda movado. La libro estas moderne komponita, en du tempaj niveloj – moderna tempo kaj mezepoko kaj estas dediĉita „al ĉiu Enriko, al ĉiu Cipora, kiuj jarcentojn persekutataj, masakrataj, forbruligataj, atestas pri morto de Homo, samkiel al ĉiuj Maria, ĉiu sinjoro Loazel, kiuj, jarcentojn obstine kontraŭstarante, redonis honoron kaj esperon al Homo“. La temo de la romano estas ĝenerale homa kaj humana. Mi ne povas taksu tradukon el franca lingvo, ĉar mi ne scipovas tiun lingvon, sed mi konfesas ke mi kun ĝojo legis ĝin, se mi eksceptas la kvietan akran malĝojon kiu akompanas multajn librojn de aŭtoroj kiu apartenas al tiu nacio, kaj kialon mi vidas en vortoj kiujn mi ĵus citis.

Esperantistoj, kiuj regule legas nian revuon Beogradan Verdan Stelon, jam bone konas la tradukistan laboron de Agnesa. En la unua numero aperis la teksto Gloras por la patrujo morti de Danilo Kiŝ, en la tria numero aperis du eseetoj Printempo kaj Floroj, en la kvara numero traduko de poemoj de Eva Ras sub titolo El la kolekto kaj Arĝenta lito kaj en la sekvanta numero aperis teksto pri Eva Ras sub titolo „Du kubetoj

de sukero“. La kvina numero estis honorita per ŝia traduko de *Nenad Neša Mihailoviĉ, vinberkultivisto kaj intelektalo*, kaj en la sesa numero traduko de rakonto de Ivo Andriĉ *Deca*. Mi scias ke ŝi ne dormas, ŝi preparas novajn tekstojn por novaj numeroj de la revuo.

La portugala eldonisto de revuo LA KARAVELO ekdeziris ke traduko de Agnesa rakonto de Ivo Andriĉ aperu en lia revuo, kio okazos ĉi jare.



*Bildo: Festo de la 90-a naskiĝdatreveno de Agnesa Eremija en E-societo "Radomir Klajiĉ" en Beogrado (Agnesa Eremija la dua de maldekstre)*

Mi opinias ke la perlo de ŝia tradukado estas *Sonĝo pri amo kaj morto* de Filip David aperinta pasintjare en la eldonejo „Laguna“ kaj antaŭnelonge eldonejo „Interpres“ en Esperanto, kun permeso de la aŭtoro en traduko de sinjorino Agnesa.

Temas pri du mallongaj romanoj kies temo estis indikita en la titolo.

Mi ne deziras paroli pri la libro. Mi sendis kelkajn ekzemplerojn al redaktoroj de Esperantaj revuoj kaj gazetoj kaj ili probable pli bone verkos pri la libro kaj pri la traduko.

Mi volus konkludi ĉi tiun referaĵon per rekono kaj dankemo, ke al mi estas honoro kaj ĝojo povi kunlabori kun sinjorino Agnesa, admiri al ŝia labora energio, laboraj kutimoj kaj kapableco, kaj mi promesas, se mi estos ĉeestanta, kun ĝojo kunlaboros kun ŝi ankaŭ por la centa naskiĝtago, kaj mi deziras al ŝi ĝisatendi ĝin en bona sano kaj plena labora energio.

## VERDAJ TAGOJ EN SENTA

Esperanto Societo Senta invitas esperantistojn partopreni tradician renkontiĝon "**VERDAJ AMIKAJ TAGOJ**" kiu ĉijare organizas sub titolo "**Estonteco de ideo de Zamenhof**". Renkonto okazos de la 12-a ĝis la 14-a de junio 2009.

La 12-an de junio de la 15-a ĝis la 17 horo akcepto da gastoj en sidejo (Ĉefa strato 15) kaj je la 18 horo solena malfermo de renkontiĝo kaj je la 19 horo interkona vespero

La 13-an de junio de la 9 ĝis la 13 horo planitaj estas prelegoj pri *interna ideo de Esperanto* kaj pri *Jaro de Milutin Milankoviĉ – matematikisto, klimatologo* kaj pri *Jaro de Mikloŝ Radnoti - tragika poeto*. Post komuna tagmanĝo okazos promocio de novaj libroj. Ĝis fino de tago oni planas vidindaĵoj de la urbo kaj amuza vespero

La 14-an de junio ebla estas ekskurso por viziti tombon de Tibor Sekelj en Subotica.

Informoj ĉe prezidanto Siniŝa Veliĉkoviĉ: 024-812-218 aŭ sekretariino Magdolna Revid: 024-821-312

En Jagodina

## LA DUA KONGRESO DE SERBIAJ ESPERANTISTOJ

En urbo Jagodina, suda Serbio, de la 26a ĝis la 28a de junio okazos la Dua kongreso de serbiaj esperantistoj. Jagodina Esperanto-societo "Sreten Aĝiĉ" sendis aliĝilojn pasintsemajne al esperantistaj organizaĵoj en Serbio.

Preparoj por kongreso fluas malrapide sed sukcese, kiel oni informas el Jagodina Esperanto-societo. Elspezoj de tritaga Kongreso por unuopulo (kongresa kotizo, du noktoj kun matenmanĝo kaj tagmanĝo en hotelo kaj du komunaj vespermanĝoj) estas malpli ol 100 eŭroj. Esperantistoj povas loĝi en hotelo "Jagodina" kaj en Studenta hotelo kie elspezoj estas pli malgrandaj.

Dimitrije Janičić

## DU EVENTOJ EN NOVI SAD

La 14-an de marto 2009 pluraj geamikoj de la elstara serba poeto Miroslav Antić vizitis lian monumenton en Danuba parko, Novi Sad, laŭ iniciato de Zavod za kulturu Vojvodine (Vojvodina Kultur-Instituto, Novi Sad). Omaĝe estis recitataj kelkaj liaj poemoj. Lian impresigan porinfanan poemon recitis Boriša Milićević en la serba ("Šašava pesma") kaj en Esperanto ("Frenezeta poemo") en traduko de Zlatoje Martinov. La ĵurnalo *Dnevnik*, Novi Sad menciis la morgaŭan tagon ke la recitado okazis ankaŭ en Esperanto.

La serblingva artikolo de Boriša Milićević *Prosvećivanje i obrazovanje putem međunarodnog jezika esperanta (Klerigado kaj edukado pere de la internacia lingvo Esperanto)*, kun resumoj en Esperanto, la serba kaj la angla, aperis en *Multjezički bilten MOST (Multlingva Bulteno "Ponto")*, Novi Sad, n-ro 8, 2008. La Bulteno estas publike prezentita dufoje.

Boriša Milićević

## NIA GAZETO EN BRITISH LIBRARY

Antaŭ du semajnoj ni sendis aperintajn numerojn de "Beograda Verda Stelo" al Brita Biblioteko (Londono) al ĝia Esperanta Kolekto. Respondeca persono el Brita Biblioteko, s-no Olga Kerziouk skribis al mi la 24-an de marto:

"Kara Dimitrije,

Mi esperas ke Vi ĝojos aŭdi ke hodiaŭ mi katalogis la donacitajn numerojn de "Beograda Verda Stelo".

Esperable post monato-du ĝi ricevos la bibliotekan numeron kaj legontoj povos mendi kaj legi ĝin.

Dume la Esperanta Kolekto en la Brita Biblioteko ne estas tre granda (kompare kun la Biblioteko Butler kaj eĉ kun la Nacia Biblioteko de Skotlando - W. Auld donacis sian tutan kolekton al la Nacia Biblioteko de Skotlando).

Vi povas kontroli nian elektronikan katalogon:

<http://catalogue.bl.uk>

kaj vidi mem kiujn librojn kaj revuojn ni jam havas. (Ekz. tradukojn el Ivo Andrić.)

Dezirante al vi multajn sukcesojn

Amike

Olga"

Kompreneble, mi mem ĝojas pro tio kaj esperas ke ĉiuj esperantistoj nun povas vidi nian modestan revuon en katalogo de Brita Biblioteko.

Dimitrije Janičić

# Esperanto-kurso

Бориша Милићевић

## *Konversacio*

aspekti	-изгледати	ĉar	-јер, пошто
teatro	-позориште	teatraĵo	-позоришни комад
kino	-биоскоп	kinejo	-биоскопска сала
multe	-много	ŝati	-ценити, волети
kiel	-како, као	tiel	-тако, онако
tiel ĉi или ĉi tiel	-овако	jen	-ево, ето, ено, гле
ĉiu	-свако, сваки, а, о	ĉio	-све
foriri	-отићи	certe	-сигурно
frukto	-плод	fruktoj	-плодови, воће
for	-напоље! даље; од- или от- (+ глагол)		

- Saluton, amiko! Vidu, vidu, bele vi aspektas hodiaŭ!  
-Mi aspektas, kara amiko, pli bele ol hieraŭ, ĉar mi vidos unu teatraĵon.  
-Mi ne ŝatas teatron tiel multe kiel kinon.  
-Diru kiel fartas via fratino. Ĉu vi havas novaĵojn?  
-Jes, ŝi volas veni kiel eble plej baldaŭ. Jen mi havas ŝian sendaĵon.  
-Salutu ŝin kaj diru ke ŝi posedas unu grandan pozitivan econ: ŝi komprenas ĉiun.  
Pro tio ŝi havas multajn amikojn.  
-Jes, ŝi estas tiel bona. Estas tempo ke mi foriru.  
-Ĝis la revido. Venu morgaŭ por ke ni lernu kune.  
-Bone, mi vizitos vin certe. Saluton.

## Proverboj

- Lernado sen fruktoj ne restas.      -Учење не остаје без плодова.  
Ne ĉio, kio brilas, estas oro.      -Није злато све што сија.

∴

## Префикс ек- означава:

-почетак радње у корену речи.

labori	-радити	eklabori	-почети радити
skribi	-писати	ekskribi	-почети писати
manĝi	-јести	ekmanĝi	-почети јести

**-тренутну радњу у корену речи.**

rigardi	-гледати	ekrigardi	-погледати
pensi	-мислити	ekpensi	-помислити

∴

**Префикс ге- означава пак:**

**-понављање радње у корену речи.**

vidi	-видети	revidi	-поново видети
fari	-чинити, правити, вршити	refari	-поново чинити, поново правити, преправити
formi	-обликовати, формирати	reformi	-поново обликовати, реформирати, реформисати

**-враћање у стање или место из кога се пошло.**

veni	-доћи	reveni	-вратити се
sendi	-послати	resendi	-послати натраг

**Као засебна реч гее значи опет, поново.**

**Сад нам је јасно да поздрав ĝis la revido, дословно преведен, значи до поновног виђења.**

∴

**Кад се дода на корен речи, суфикс –иј означава:**

**- Кутију, посуду за оно што је у корену речи.**

salo	-со	salujo	-сланик
mono	-новац	monujo	-новчаник, буђелар
kafo	-кафа	kafujo	-суд за кафу, цезва

**-Стабло плода или цвета у корену речи. Пошто истовремено може да значи посуду за плодове тог стабла, суфикс –иј се замењује овде речју –arbo (дрво, стабло).**

romo	-јабука (плод)	romujo	-јабука (стабло) и посуда за јабуке, стога <u>romarbo</u>
ĉerizo	-трешња (плод)	ĉerizujo	-трешња (стабло) и посуда за трешње, стога <u>ĉerizarbo</u>
piro	-крушка (плод)	pirujo	-крушка (стабло) и посуда за крушке, стога <u>pirarbo</u>

**-Када се дода на назив припадника народа, означава земљу, државу.**

serbo	-Србин	Serbujo	-Србија
hungaro	-Мађар	Hungarujo	-Мађарска
rumano	-Румун	Rumanujo	-Румунија
norvego	-Норвежанин	Norvegujo	-Норвешка

**-Ако је назив припадника народа кратак, обично се, уместо суфикса –иј употребљава реч –lando (земља).**

sviso	-Швајцарац	Svisujo или Svislando	-Швајцарска
polo	-Пољак	Polujo или Pollando	-Пољска

**-Посебно за означавање земаља са више народа и народности, уместо суфикса –иј употребљава се суфикс –i(o).**

jugoslavo	-Југословен	Jugoslavio	-Југославија
-----------	-------------	------------	--------------

**У новије време суфикс i(o) се употребљава и за друге земље.**

∴

(наставиће се)



94-a Universala Kongreso de Esperanto  
25.07-1.08.2009  
Bjalistoko, Pollando



La 61-a kongreso de IFEF,  
Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, okazos  
en Triesto (Italio)  
de la 23-a ĝis la 29-a de majo 2009.



La 42-a konferenco de ILEI  
okazos en Krakovo (Pollando)  
de la 17-a ĝis la 25-a de julio 2009



La 2-a kongreso de serbiaj esperantistoj  
okazos en Jagodino (Serbio)  
de la 26-a ĝis la 28-a de junio 2009